



**Moderna minaco:  
radioaktiveco**

**Japanio: frustrigo  
de marĝena suferanto**

# MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...

Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Serio Stafeto n-ro 33

Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 714 g, 624 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-39-3; prezo ĉe FEL 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

## La venkanto heredos ĉion ...

Referendumoj tiel maloftas en Britio kiel senpluvaj someroj. Okazis nacia referendumo en 1975 pri la daŭra membriĝo de Britio en tiama Eŭropa Komunumo, nuna Eŭropa Unio. Okazis ankaŭ lokaj aŭ regionoj referendumoj, ekzemple en 1997 pri la kreado de nacia asembleo en Kimrio kaj nacia parlamento en Skotlando.

Tamen dum 36 jaroj, post la referendumo en 1975, ne plu okazis simila tutlanda plebiscito. Almenaŭ ne ĝis majo 2011, kiam la koalicia registaro, elektita en 2010, ebligis al la brita popolo tiamaniere decidi pri voĉdonada sistemo por la nacia parlamento.



THE PRIME MINISTER'S OFFICE

7

## Frustrigo de margena suferanto



La 11an de marto posttagmeze mi estis, kiel kutime, en la universitata oficejo en la kvara etaĝo. Je la 14a kaj 46 minutoj mi sentis tremetojn. Evidente temis pri komenciĝanta tertremo.

12

## Moderna minaco: radioaktiveco

Okaze de la natura katastrofo en Japanio – tertremego kun tuj posta cunamo – kaj la tuj sekvinta nuklea katastrofo en Fukuŝimo rezulte de la cunamo – ŝajnas esti necese iomete detali la radiadajn problemojn, kiujn la japanoj nun aldone alfrontas. Do kio estas radioaktiveco?

De radioaktiveco estas tri ĉefaj specoj: alfa-radiado, beta-radiado kaj gama-radiado, nomitaj laŭ la unuaj tri literoj de la greka alfabeto.

16

### politiko

|                                |   |
|--------------------------------|---|
| <b>BRITIO</b> .....            | 7 |
| La venkanto heredos ĉion       |   |
| <b>ESEO</b> .....              | 8 |
| Belas malgrando                |   |
| <b>EŬROPA UNIO</b> .....       | 8 |
| Libera moviĝo, liberaj opinioj |   |

### moderna vivo

|                                |    |
|--------------------------------|----|
| <b>ĈINIO</b> .....             | 9  |
| Vilaĝoj sen gepatroj           |    |
| <b>PAFILOJ</b> .....           | 9  |
| Tragedio en lernejo            |    |
| <b>LITOVIO</b> .....           | 10 |
| Lando parfumita                |    |
| <b>LA HEJMO</b> .....          | 10 |
| Konsiloj avinaj kaj neavinaj   |    |
| <b>VIRINOJ</b> .....           | 11 |
| Koalicia kompromiso            |    |
| <b>INFANOJ</b> .....           | 11 |
| Hela helpo                     |    |
| <b>JAPANIO</b> .....           | 12 |
| Frustrigo de margena suferanto |    |
| <b>HOMAJ RAJTOJ</b> .....      | 13 |
| Ne forgesitaj – post 50 jaroj  |    |
| <b>MUZEJOJ</b> .....           | 14 |
| Vakso vokas ...                |    |

### turismo

|                        |    |
|------------------------|----|
| <b>FINNLANDO</b> ..... | 15 |
| Ludilmuzeo de Helsinko |    |

### scienco

|                               |    |
|-------------------------------|----|
| <b>AKTUALE</b> .....          | 16 |
| Moderna minaco: radioaktiveco |    |

### spirita vivo

|                         |    |
|-------------------------|----|
| <b>KURACADO</b> .....   | 19 |
| Fondaĵo „E-vid-E-nt-E”  |    |
| jam 45 jarojn aktivadas |    |

### libroj

|                                         |    |
|-----------------------------------------|----|
| Instrua, instiga, inspira! .....        | 21 |
| Socia dokumento pri nia larmovalo ..... | 22 |

### eseo

|                               |    |
|-------------------------------|----|
| Utimura Kanzo                 |    |
| antaŭ 150 jaroj naskiĝis..... | 23 |

### enigmoj

|                              |    |
|------------------------------|----|
| La solvo de la flaŭra enigmo |    |
| (Monato 11/2010) .....       | 26 |

|                         |    |
|-------------------------|----|
| › Abonoj .....          | 4  |
| › Enkonduko .....       | 5  |
| › El mia vidpunkto..... | 6  |
| › Anoncetoj.....        | 27 |

## ► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be).
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

| Ŝtato de la paganto |     | MONATO  |      |       | LA JARO aere |          |
|---------------------|-----|---------|------|-------|--------------|----------|
|                     |     | surface | aere | rete  | 3a klaso     | 1a klaso |
| Argentino           | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Aŭstralio           | AUD | 87      | 92   | 52,2  | 9,5          | 15       |
| Aŭstrio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Belgio              | EUR | 49      | 58   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Bosnio-Herc.        | BAM | 50      | 55   | 30    | 11           | 18       |
| Brazilo             | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Britio              | GBP | 44      | 47   | 26,4  | 5            | 7        |
| Bulgario            | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Ĉeĥio               | EUR | 39      | 42   | 23,4  | 5,5          | 9        |
| Danio               | DKK | 366     | 396  | 219,6 | 41           | 67       |
| Estonio             | EUR | 29      | 32   | 17,4  | 5,5          | 9        |
| Finnlando           | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Francio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Germanio            | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Grekio              | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Hispanio            | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Hungario            | HUF | 8100    | 8900 | 4860  | 1530         | 2500     |
| Irlando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Islando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Israelo             | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Italio              | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Japanio             | JPY | 7980    | 8500 | 4788  | 860          | 1200     |
| Kanado              | CAD | 78      | 84   | 46,8  | 9            | 14       |
| Kipro               | EUR | 39      | 42   | 23,4  | 5,5          | 9        |
| Koreio              | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Kostariko           | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Kroatio             | EUR | 29      | 32   | 17,4  | 5,5          | 9        |
| Latvio              | EUR | 29      | 32   | 17,4  | 5,5          | 9        |
| Litovio             | EUR | 29      | 32   | 17,4  | 5,5          | 9        |
| Luksemburgo         | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Malto               | EUR | 39      | 42   | 23,4  | 5,5          | 9        |
| Nederlando          | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Norvegio            | NOK | 430     | 460  | 258   | 48           | 71       |
| Nov-Zelando         | NZD | 105     | 111  | 63    | 11,5         | 18       |
| Pollando            | PLZ | 115     | 126  | 69    | 23           | 36       |
| Portugalio          | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Rusio               | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Serbio              | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Slovakio            | EUR | 29      | 32   | 17,4  | 5,5          | 9        |
| Slovenio            | EUR | 39      | 42   | 23,4  | 5,5          | 9        |
| Sud-Afriko          | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Svedio              | SEK | 499     | 543  | 299,4 | 56           | 85       |
| Svislando           | CHF | 82      | 88   | 49,2  | 9            | 14       |
| Usono               | USD | 78      | 82   | 46,8  | 8            | 13       |

## ► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: [libroserv@esperanto.org.au](mailto:libroserv@esperanto.org.au).
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at).
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be).
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: [info@esperanto.ba](mailto:info@esperanto.ba).
- > **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org).
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz).
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: [virveernits@hotmail.ee](mailto:virveernits@hotmail.ee).
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: [eafofficejo@esperanto.fi](mailto:eafofficejo@esperanto.fi).
- > **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: [esperanto-france@esperanto.org](mailto:esperanto-france@esperanto.org).
- > **Germanaj:**
  - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: [robo.espero@acn-mail.de](mailto:robo.espero@acn-mail.de).
  - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de).
  - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: [wolfgang.schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de).
  - > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: [kea-kasisto@esperanto.cat](mailto:kea-kasisto@esperanto.cat).
  - > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: [abonasoft@gmail.com](mailto:abonasoft@gmail.com).
  - > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: [noviresp@eircom.net](mailto:noviresp@eircom.net).
  - > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: [esperant@ismennt.is](mailto:esperant@ismennt.is).
  - > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: [fesp.it@infinito.it](mailto:fesp.it@infinito.it).
  - > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp).
  - > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: [yan@storm.ca](mailto:yan@storm.ca).
  - > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: [esperanto@saluton.net](mailto:esperanto@saluton.net).
  - > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250,

- Escáz. Reto: [miaumiau@ice.co.cr](mailto:miaumiau@ice.co.cr)
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: [marija.belosevic@zg.t-com.hr](mailto:marija.belosevic@zg.t-com.hr)
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: [Margarita@rsu.lv](mailto:Margarita@rsu.lv).
- > **Litova:** Laimius Straznickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: [laimiuslt@gmail.com](mailto:laimiuslt@gmail.com).
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: [wickler.albert@gmx.net](mailto:wickler.albert@gmx.net)
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net).
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: [inform@esperanto.no](mailto:inform@esperanto.no).
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz)
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: [dankal@epf.pl](mailto:dankal@epf.pl).
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: [portugala@esperanto.web.pt](mailto:portugala@esperanto.web.pt).
- > **Ruslandaj:**
  - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: [sezonoj@gazinter.net](mailto:sezonoj@gazinter.net).
  - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: [mikaelo@km.ru](mailto:mikaelo@km.ru).
  - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: [zciric@eunet.rs](mailto:zciric@eunet.rs).
  - > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: [marcek@esperanto.sk](mailto:marcek@esperanto.sk).
  - > **Slovenaj:**
    - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: [visnja.brancovic@os.htnet.hr](mailto:visnja.brancovic@os.htnet.hr).
    - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: [marija.belosevic@zg.t-com.hr](mailto:marija.belosevic@zg.t-com.hr)
    - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: [cbeckford@telkomsa.net](mailto:cbeckford@telkomsa.net).
    - > **Svedaj:**
      - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: [persson.esperanto@telia.com](mailto:persson.esperanto@telia.com).
      - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: [bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com).
      - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch).
      - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: [elna@esperanto-usa.org](mailto:elna@esperanto-usa.org)

# Tekniko



Christina Schwarzenstein estas la nova teknika redaktoro de MONATO.

Ĉu ankaŭ vi unue legas la kolofonon de la revuo kaj nur poste ĉion ceteran? Estas dubinde, ke multaj legas ĝin, kvankam tie vi ja trovas interesajn informojn pri via ŝatata magazino. Ke Stefan Maul ne plu estas ĉefredaktoro, sed nun honora ĉefredaktoro, kaj ke Paul Gubbins transprenis lian respondecan taskon, vi jam legis tie ĉi. Sed eble vi pasintmonate rimarkis en la kolofono la aldonon de „Teknika redaktoro: Christina Schwarzenstein“.

Kio estas teknika redaktoro? Manuskriptoj devas esti ne nur enhave kaj lingve ĝustaj, sed ankaŭ forme. Ekzemple, supre de tiu ĉi teksto vi vidas la titolon „Tekniko“. Por ke tiu titolo en ĉiuj diversaj versioj de nia magazino – la papera kaj la diversaj elektronikaj formoj kiel ePub kaj PDF – aperu ĝuste, necesas, ke en la manuskripto ĝi aspektu tiel: <t>Tekniko</t>, en kio, kompreneble, la etikedo <t> signifas

„tie ĉi komenciĝas la ĉeftitolo“ kaj </t> estu komprenata kiel „tie ĉi finiĝas la ĉeftitolo“. Ekzistas kvindekda tiaj etikedoj, kaj estas la tasko de la teknika redaktoro kontroli ilin kaj, se necese, korekti. Poste tiu redaktoro plusendas la manuskriptojn al la diversaj reviziantoj, korespondas kun ili, se necese, ktp.

Kaj kiu estas la teknika redaktoro? Christina Schwarzenstein jam de pluraj jaroj laboras ĉe Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kaj en la eldonejo de MONATO. Ŝi denaske estas berlinanino, sed de longa tempo loĝas en Antverpeno. Ekster MONATO ŝi kunlaboras en la butikoj de FEL, zorgas pri la prezalkulado de presaĵoj, pri la sendado de leteroj al ĉiuj membroj kaj multo alia.

Ni deziras al ŝi multe da agrablaj laborhoroj en ŝia plivastigita funkcio!

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen.

## eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: info@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

## sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL\_Antwerpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernity: <http://flandra-esperanto-ligo.ipernity.com>

## honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

## ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: [chefredaktoro@monato.net](mailto:chefredaktoro@monato.net).

## reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kovács, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

## redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: [redakcio@monato.net](mailto:redakcio@monato.net).

## teknika redaktoro:

Christina Schwarzenstein

## grafiko:

Julia Litvinova.

## redaktoroj:

- Arto: Claude Nourmont-Moon, 2 Om

Klappchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: [arto@monato.net](mailto:arto@monato.net).

- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: [ekonomio@monato.net](mailto:ekonomio@monato.net).

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: [enigmoj@monato.net](mailto:enigmoj@monato.net).

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: [hobio@monato.net](mailto:hobio@monato.net).

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: [komputado@monato.net](mailto:komputado@monato.net).

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: [leteroj@monato.net](mailto:leteroj@monato.net).

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: [libroj@monato.net](mailto:libroj@monato.net).

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schallhoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg

Rete: [lingvo@monato.net](mailto:lingvo@monato.net).

- **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: [medio@monato.net](mailto:medio@monato.net).

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: [moderna\\_vivo@monato.net](mailto:moderna_vivo@monato.net).

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: [noveloj@monato.net](mailto:noveloj@monato.net).

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: [politiko@monato.net](mailto:politiko@monato.net).

- **Scienco:** Rete: [scienco@monato.net](mailto:scienco@monato.net).

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: [spirita\\_vivo@monato.net](mailto:spirita_vivo@monato.net).

- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferser Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: [sherco\\_kaj\\_satiro@monato.net](mailto:sherco_kaj_satiro@monato.net).

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: [turismo@monato.net](mailto:turismo@monato.net).

# Pri papoj kaj princoj

Paul GUBBINS

En 2005, kelkajn semajnojn post la morto de la papo Johano Paŭlo la 2a, mi tralegis kaj poentis ekzercojn de unuajaraj studentoj pri ĵurnalismo. La tasko: verki 500-vortan raporton, aŭ profilon, pri homo admirinda.

La studentoj rajtis mem elekti sian admirindulon – kaj plejparte ili elektis verki pri la antaŭ nelonge forpasinta papo. Strange. Britio estas esence sekulara ŝtato, en kiu religioj estas tolerataj de la vasta majoritato de la popolo, sed praktikataj de nur malvasta minoritato. Nur, fakte, la ŝtato – ne la popolo – en iu grava punkto maltoleras romkatolikismon; al tiu ĉi punkto mi revenos.

Do la elekto de Johano Paŭlo la 2a parte surprizis, parte deprimis min. Surprizis, ĉar, kiel dirite, britoj ne aparte interesiĝas pri religiaj aferoj; deprimis, ĉar la studentoj pigre prenis raportojn pri la papo aperintajn en naciaj amaskomunikiloj kaj ilin senpripenso, senkritike, remuldis propracele.

Mi kredas, ke, ĝenerale, mi aljuĝis pli da poentoj al tiuj, kiuj montris originalecon kaj verkis pri aliaj figuroj, kaj kies raportoj bezonis iom pli da esplorado.

## Miraklo

Mi rememoris ĉi tiun ja naivan entuziasmon pri Johano Paŭlo la 2a, kiam mi legis, ke la romkatolika eklezio lin beatigis survoje, ŝajne, al sanktuligo. Mi notis, ke la iama papo meritas sian beatigon pro de li estigita „miraklo”: kuracado de franca monaĥino. Sed samtempe komencis forgliti la reala mondo. Kie objektiveco? Kie pruvoj? Kie la espereble neŭtralaj atestantoj, kiuj esploris la „miraklon”? Ĉu do ĉiu kuracisto, kiu savas la vivon de alia homo, estu beatigita?

Flanke estu notite, ke ne ĉiu subtenas la beatigon de Johano Paŭlo la 2a. Dum lia papeco la eklezio estis mondscale skuata de seksaj skandaloj: perfortoj fare de sacerdotoj kaj aliaj

kontraŭ junaj kaj sendefendaj infanoj. „Mi kontraŭas ĉi tiun beatigon kaj anticipas, ke la estonteco malfavore juĝos Johanon Paŭlon, kiu rifuzis akcepti, ke tiam okazas la plej terura krizo en la eklezio depost la reformacio,” opinias Richard McBrien, profesoro pri teologio ĉe la universitato *Notre Dame* en Usono.

Tamen, malgraŭ ĉio, centmiloj da adorantoj ariĝis en Romo por atesti la beatigon de Johano Paŭlo. Koincide, dum la sama semajnfino, kolektiĝis en Londono simila nombro da adorantoj de la brita reĝa familio. Kiel en Romo, prezentiĝis mezepoka pantomimo: la dua tronheredonto, Vilhelmo, nepo de la nuna brita reĝino Elizabeto, pompe kaj parade, kaleŝe kaj katedrale, edziĝas.

## Diskriminacio

Same kiel la beatigo de iama papo, la adorado de la brita monarĥio defias racion. En ĝia nuna formo ĝi devus ne ekzisti en tiel nomata moderna ŝtato. Antaŭ jarcentoj la filozofo Tomaso Pejn skribis, ke same absurdas hereda monarĥo kiel hereda kuracisto. Kaj, dum en normala socio oni provas elimini ajnan diskriminacion, brita tronheredonto – pro historiaj kialoj – ne rajtas edzinigi romkatolikon (tamen jes ateiston aŭ islamanon), dum unue naskita princino nepre devas cedi sian tronrajton al due naskita princo.

Sendube, pasio pri papoj, monarĥoj, alportas ĝojon, plezuron, eble iom da bono, kune kun sento pri komuneco, solidarigo, fortigo, al milionoj da homoj. Gravaj mitoj kaj misteroj: ili kunkreis la estantecon. Sed ilin flegi, vivteni – kiam ili baziĝas sur blinda kredo, kruda diskriminacio – jen neniel admirinda afero, por reveni al la temo de la studenta ekzerco.

Do pardonu min, se mi ekscitiĝas nek pri la beatigo de Johano Paŭlo la 2a nek pri la edziĝo de princo Vilhelmo. Mi festis nek en Romo, nek en Londono, nek antaŭ la televida ekrano en mia hejmo. Mi tamen festis la vivon, biciklante, enspirante ne la mucidan aeron de tradicio kaj privilegio, sed la freŝan aeron de simpla kaj honesta kamparo. ■



*Sendube, pasio pri papoj, monarĥoj, alportas ĝojon, plezuron, eble iom da bono, kune kun sento pri komuneco, solidarigo, fortigo, al milionoj da homoj.*

# La venkanto heredos ĉion ...

**R**eferendumoj tiel maloftas en Britio kiel senpluvaj someroj. Okazis nacia referendumo en 1975 pri la daŭra membriĝo de Britio en tiama Eŭropa Komunumo, nuna Eŭropa Unio. Okazis ankaŭ lokaj aŭ regionoj referendumoj, ekzemple en 1997 pri la kreado de nacia asembleo en Kimrio kaj nacia parlamento en Skotlando.

Tamen dum 36 jaroj, post la referendumo en 1975, ne plu okazis simila tutlanda plebiscito. Almenaŭ ne ĝis majo 2011, kiam la koalicia registaro, elektita en 2010, ebligis al la brita popolo tiamaniere decidi pri voĉdonada sistemo por la nacia parlamento.

Apenaŭ imageblas pli ĥaosa kaj senkohera politika sistemo ol en Britio. Dum partoj de la tiel nomata Unuiĝinta Reĝlando – Kimrio, Norda Irlando kaj Skotlando – ĝuas proprajn parlamentojn, Anglio ne havas. Cetere, je loka nivelo, kelkaj regionoj, ekzemple Londono, elektas urbestrojn, kun relative grandaj povoj. Aliaj regionoj estas administrataj de magistratoj (en kamparaj distriktoj fojfoje dutavolaj: urbataj kaj regionaj).

## Deputitoj

Krome oni uzas diversajn manierojn, jen proporciajn, jen ne, por elekti ekzemple deputitojn al la diversaj parlamentoj: la eŭropa, la brita, kaj la kimra, nord-irlanda kaj skota. Sama senkohero pri urbestroj kaj magistratoj. Ĉu mirindas, ke partoprenado en britaj elektoj ĝenerale mizeras: homoj apenaŭ komprenas kiel, kaj por kiu, ili voĉdonu.

Tradicie, balotoj por elekti nacian parlamenton okazas laŭ simpla majoritata sistemo. Voĉdonanto metas x-on apud la nomon de preferata kandidato, kaj venkas tiu, kiu ricevas pli da x-oj ol siaj rivaloj. Tio signifas, ke, ekzemple, se kandidato A ricevas 20 000 manda-

tojn, kandidato B 19 999, kaj kandidato C 19 999, kandidato A estas elektita, malgraŭ tio, ke pli da homoj malfavoris ol favoris la venkinton. Pro manko de proporcia sistemo la B- kaj C-mandatoj estas efektive nulaj: neniel ili influas la rezulton.

Reale, tio signifas, ke 433 el la 650 nunaj deputitoj en la nacia parlamento elektiĝis per malpli ol 50 % de la voĉoj. Tio estas, ke pli da homoj ĉe la urnoj ilin malaprobis ol aprobis. Paralele, neniu brita parlamento ekde 1935 estis apogita de pli ol 50 % de la voĉdonintoj. En 1951 kaj 1974 partioj, kiuj gajnis malpli da mandatoj ol la venkinta, formis registaron.

## Maljusteco

Agnoskita, almenaŭ en kelkaj politikaj rondoj, estas la maljusteco de la nuna sistemo. Pro tio, kiam la maldekstre, malgranda Liberaldemokrata Partio konsentis subteni konservativulojn kaj kunkrei en majo 2010 registaran koalicion, unu el la kondiĉoj estis referendumo pri nova voĉdon-sistemo.

Unue, laŭ opinio-sondadoj, ŝajnis, ke britoj pretas akcepti la referendumon proponon, nome, ke oni uzu la tiel nomatan alternativan sistemon – ankoraŭ ne proporcian – kiu anstataŭus krucon per ciferoj. Voĉdonantoj listigus, laŭprefere, unudutrie, la kandidatojn, tiel ke post unua kalkulado-rondo la mandatoj de la lasta kandidato estus distribuataj inter la aliaj, ĝis fine unu el la kandidatoj atingus 50 % de la voĉoj.

Tamen ju pli konservativuloj – kaj en kaj ekster la Konservativa Partio – konsciis, ke la alternativa sistemo helpus liberaldemokratojn, verdulojn kaj aliajn malgrandajn partiojn (ĉar fine voĉdonantoj vidus, ke, ilin subtenante, ili ne malŝparus sian voĉon, ĉar ĉiuj

voĉoj povus influi la rezulton), des pli ili timis pri sia tradicia hegemonio.

## Krude kruca

Ekspluatante la malpopularecon de la vic-ĉefministro, kaj estro de la liberaldemokratoj, Nick Clegg [nik kleg], oponantoj kalumnie persvadis la popolon, ke la proponata sistemo tro komplikos (kio? unudutrie?), ke ĝi tro kostos (pro balotilo-kalkuliloj, kiujn fakte neniu proponis), ke nur tri aliaj landoj en la mondo uzas la alternativan sistemon (ne menciante, ke aliaj landoj plejparte uzas proporciajn sistemojn, kiuj estas oble pli justaj ol la kompromisa alternativa aŭ la tute senjusta kaj krude kruca simpla majoritata sistemoj).

La rezulto: granda bato kontraŭ liberaldemokratoj kaj aliaj progresemuloj: plene 71 % de tiuj, kiuj voĉdonis (tamen nur 40 % de voĉrajtigitoj), elektis reteni la nunan sistemon. Tiel estos sufokata, verŝajne dum tuta generacio, ajna debato pri voĉdonaj reformoj.

## Influo

Pluvivado de la apokalipsa principo, ke la venkanto heredos ĉion, kune kun aliaj ŝanĝoj proponataj por „masaĝi” elekto-distriktojn favore al konservativuloj, signifas, ke maldekstruloj, verduloj kaj aliaj restos dividitaj, sen efika politika influo ĉe la urnoj, samtempe vid-al-vide al unuiĝinta, potenca kaj relative riĉa Konservativa Partio.

Ne mirigis, ke post la rezulto la vizaĝo de la konservativa ĉefministro, David Cameron [dejvid kámaran], radiis per ĝojo. Lia partio, malgraŭ brutala ŝpar-politiko, apenaŭ suferis en samtempaj municipaj balotoj. Male la koalicia partnero, la liberaldemokratoj, kiujn elektintoj kulpigis pro la videblaj rezultoj – fermataj bibliotekoj, ŝrumpiĝantaj san- kaj aliaj servoj, senlaboreco ktp – de esence konservativaj politikoj.

Cameron krome scias, ke, se nur 12 % de la popolo iris al la urnoj por subteni reformon progreseman, justan kaj demokratian, la estonteco de konservativismo kaj dekstrismo en Britio estos dum longa tempo sekura.

Paul GUBBINS

# Belas malgrando

**E**n 1957 aperis la unua eldono de rimarkinda libro verkita de aŭstra profesoro pri ekonomio, Leopold Kohr. Ĝia anglalingva titolo estis *The Breakdown of Nations (La disrompiĝo de nacioj)*.

Leginte la verkon, mi havis la okazon aŭskulti prelegon faritan de d-ro Kohr. Amiko mia, kiu tiam redaktis ĵurnalon en Skotlando, petis, ke mi priraportu internacian konferencon en Londono je la temo de malgrandaj nacioj. Mi estis profunde imponita de la ideoj de Kohr, kaj neniam ŝanĝis mian opinion, ke li pravis.

La ekpremiso de Kohr tielas: Ekzistas nur unu ĉefa kaŭzo de socia mizero – nome *grandeco*. Oni atingos mensan sanon, pacon, kaj eĉ postvivadon de la

homaro, nur post kiam la plej grandaj ŝtatoj disrompiĝos en etajn ŝtatojn.

## Konvinkita

Oni ne povas nei, ke mizero kaj malfaco daŭre estas kreitaj de gigantaj ŝtatoj kaj imperioj. Pro tio mi estas konvinkita, ke tiuj politikaj gigantoj malaperu per la sendependiĝo de la popoloj, kiuj konsistigas tiajn verajn aŭ virtualajn imperiojn. Se ne, la homaro estos plejparte kondamnita al eterna totala aŭ parta sklaveco.

Pro tio mi ĝojis, kiam la brita imperio dissolviĝis en sendependajn naciojn, kaj kiam Sovetio kolapsis, liverante liberecon al la baltaj landetoj kaj al la ĉirkaŭantaj satelitaj ŝtatoj. Neniu etno rajtas superregi aliajn. Ni ĉiuj naskiĝas

liberaj, sed en ĉiu parto de la mondo homoj ankoraŭ vivas ĉenitaj.

## Malfermita

Ankaŭ pro tio, mi, filo de skotaj gepatroj (kvankam ne loĝanta en Skotlando), ege bonvenigis lastatempajn novaĵojn, ke la Skota Nacia Partio gajnis absolutan majoritaton en la elektoj por la parlamento en Edinburgo. Tiel estas malfermita la vojo al referendumo pri sendependiĝo de tiu norda kelta nacio.

Dumlonge imponas min, ke la plej prosperaj kaj kontentaj landoj en Eŭropo estas la plej etaj, dum la plej arogantaj, militemaj kaj tiranaj estas la plej grandaj. Kompreneble, malgrandaj ŝtatoj povas esti maljustaj kaj kruelaj – oni menci nur la hororojn de la balkanaj militoj por tion konstati – sed ĝenerale la plej feliĉaj popoloj estas la malgrandaj.

Skotlando ankoraŭ ne estas sendependa kaj eble neniam estos. Sed mi esperas, ke en la estonteco la mondo konsistos el etaj, liberaj kaj kontentaj ŝtatoj.

Garvan MAKAI



Albana deputito Jozefina Topalli: la asertoj de la rumana deputito Boŝtinaru memorigas pri la epoko de la rumana diktatoro Ceaușescu.

## EŬROPA UNIO

# Libera moviĝo, liberaj opinioj

**K**oleris albanoj, kiam rumana deputito en la Eŭropa Parlamento, Viktor Boŝtinaru, diris, ke EU nuligu la pli liberan vizo-reĝimon por albanoj. Jam ekde decembro pasintjare albanoj rajtas libere moviĝi tra la t.n. Ŝengen-landoj de Eŭropa Unio.

Albana deputito, Jozefina Topalli, akuzis la rumanon pri rasismo, dirante, ke lin influas eksterlandaj malamikoj de

Albanio. Albanoj respektas la regulojn rilate liberan moviĝon, ŝi diris, kaj senkiale postuli nuligon de tiu ĉi rajto „kanajlas”.

Boŝtinaru, kadre de dutaga konferenco pri Balkanio okazanta en aprilo, neis la asertojn de sinjorino Topalli, taksante ilin „ofendaj”.

Bardhyl SELIMI

ĈINIO

# Vilaĝoj sen gepatroj

**A**ntaŭ nelonga tempo, post pli ol trihora piedirado, scivola ĵurnalisto atingis vilaĝon ĉe la piedo de monto. Lian atenton tuj kaptis ĉirkaŭ sesjara knabino, kun mieno nepriskribebla, sole ludanta antaŭ sia kaduka loĝdomo.

La ĵurnalisto demandis ŝin: „Kun kiuj vi loĝas?” La knabino tuj respondis: „Kun miaj geavoj.” „Kaj viaj gepatroj?” la ĵurnalisto plu demandis. Sed la knabino ne volis respondi kaj nur murmuris ion.

La vilaĝo konsistas el pli ol 50

familioj kaj la loĝantoj estas aŭ junaj aŭ maljunaj. Preskaŭ ĉiuj loĝdomoj estas malnovaj kaj kadukaj. La vilaĝestro, pli ol 50-jara, diris al la ĵurnalisto, ke en lia vilaĝo la laborkapabluloj forlasis siajn familiojn kaj iris al aliaj lokoj por labori.

## Printempa Festo

Iliaj gefiloj loĝas kun siaj geavoj, kiuj dorlotas siajn genepojn. Tiuj tamen ĉiam sopiras je siaj gepatroj kaj vivas sen gepatra amo. Nur dum la Printempa Festo, la plej grava festo de Ĉinio, kelkaj

gepatroj hejmenrevenas por ĝui festan etoson kun la familianoj. Ĝuste pro tio la gepatroj fremdas en la okuloj de siaj gefiloj.

En Ĉinio, precipe en la okcidento, la ekonomio estas relative postrestinta. Oni ne povas trovi laboron en fabrikoj aŭ aliaj kompanioj. Vilaĝoj tiaj estas grandnombraj, kaj la laborkapabluloj forlasis siajn hejmojn por labori en urboj kaj tie gajni pli da mono. Tia fenomeno ekzistas jam de pli ol 30 jaroj en Ĉinio.

Ekonomikistoj opinias, ke la ĉina ekonomio rapide disvolviĝas ĝuste pro tiuj homoj. Kvankam ili ne posedas specialajn spertojn, ili tamen senlace laboras. Komence neniu atentis la sorton de iliaj gefiloj, sed nun la registaro pli kaj pli pri ili konscias. La geknaboj estas la estonteco de la ŝtato, kiu iam dependos de ili.

Xu Jinming

PAFILOJ

# Tragedio en lernejo

**M**atene de la 7a de aprilo 2011 okazis amasmortigo en publika lernejo de la brazila urbo Rio-de-Ĵaneiro. La murdinto estas ekslernanto.

Wellington Menezes [ŭéliton menezis] venis en sian iaman lernejon *Tasso da Silveira* [tasu da siŭvejra] kaj, pre-tekste, ke li volas preni dokumenton, facile

trompis la funkciulinon, kiu enlasis lin.

Li supreniris ĝis la dua etaĝo kaj, portante du revolverojn, ekpafis en du el la tieaj klasĉambroj. Lernejanoj meze de la paniko sukcesis kontakti policianojn, kiuj – tute hazarde – reguligis trafikon proksime al la lernejo.

## Kuglo

Serĝento Márcio Alves [marcju aŭvis] senprokraste eniris la lernejon. Li trovis la murdinton tiam, kiam tiu estis suprenironta al la tria etaĝo. Menezes provis mortigi la policanon, sed tiu pli rapide reagis. Kuglo de la policano trafis la murdinton en la kruron. Vundita, Menezes sin mortigis per kuglo en sian kapon.

La ago de la serĝento preventis pli grandan tragedion. Tamen mortis 12 gelernantoj, kaj multaj aliaj estas vunditaj. La fakto, ke dek el la mortigitaj estas knabi-

noj, eble montras psikologian trajton de la murdinto. Aldonindas prefero pafi en la kapon aŭ la torakon de la viktimoj.

## Letero

En poŝto de la murdinto troviĝis letero, en kiu Menezes detalas, kiel oni preparu lian korpon por enterigo. Petante la pardonon de Dio, li esperis reveni al la vivo per la mano de Jesuo.

La amasmortigo ligiĝas kun la kontraŭleĝa komerco de pafiloj. Tiamaniere supozeble mense malsana junulo, ne konata al la polico, aĉetis du revolverojn kaj pafis pli ol 60 kuglojn en gimnazianojn. La polico jam arestis du vendistojn de unu el la pafiloj kaj malkovris la sumon pagitan de Menezes: 260 realojn (113 eŭrojn).

Jozefo LEJC



*Serĝento Márcio Alves rapide reagis kaj, enirinte la lernejon, preventis eĉ pli teruran tragedion.*

LITOVIO

## Lando parfumita



**F**lareblas Litovio danke al parfumo, kiu – laŭ la kreintoj – unike en la mondo simbolas tipajn naciajn trajtojn. „Odoro de Litovio” estas produktita de la franca kompanio „Galimard” kiel, laŭdire, favora, emocia kaj originala simbolo de la lando.

La parfumo, laŭ la kreintoj, entenas la tutan historion de la lando, inkluzive de la naturo, spertoj, atingoj kaj venkoj de la popolo. La superaj nuancoj de la odoro spegulas, kiaj estas la litovoj: ili vivas en ĉirkaŭaĵo de verda naturo, havas komfortajn urbojn, uzas modernajn teknologiojn kaj estas kleraj.

### Pagana

La mezaj nuancoj montras, kiaj la litovoj estis kaj estas dum jarcentoj: favoraj al tradicioj kaj historia-kultura heredaĵo, laboremaj, kuraĝaj kaj kreemaj. La bazaj nuancoj indikas la fieron de la litovoj pri sia plej antikva hindeŭropa lingvo, pri sia plej malnova kaj plej granda balta lando kun pagana pasinteco, kaj pri sia toleremo por aliaj popoloj kaj religioj.

„Odoro de Litovio” freŝigas ĉambrojn, meblojn, tapiŝojn kaj kurtenojn. Ĝi vendeblas tie, kie oftas eksterlandanoj, por ke tiuj portu hejmen odorantan suveniron pri sia vizito.

LAST

LA HEJMO

## Konsiloj avinaj kaj neavinaj

**E**n Italio oni parolas pri „avinaj konsiloj” por indiki malmultekostajn solvojn por la pli-malpli grandaj zorgoj de la ĉiutaga vivo. Tamen, ĉar eĉ avinoj fojfoje ne havas tempon persone transdoni sian saĝon, oni kaptis la „bonan ideon” kolekti tiujn konsilojn ĉe la retejo ([www.buon-ai-dea.it](http://www.buon-ai-dea.it)).

Kiamaniere forigi maĉgumon de sur plandumo? Simple, metu la ŝuon nelonge en frostujon kaj pro la malalta temperaturo eĉ la plej obstina gumo malgluiĝos. Kiamaniere enbati najlon sen lasi lunajn kraterojn en la muro? Enpiku la najlo-pinton en tualetsapon kaj la najlo penetros en la muron per duo da frapetoj, kvazaŭ en vakson, lasante la stukajon senvunda. Kiamaniere distingi freŝan kafon disde malfreŝa? Ĵetu iomete da kaspulvoro en glason da akvo kaj la kafo freŝa flosos, la malfreŝa male.

### Akvo

Eble la plej sagaca konsilo jenas. Unu tagon antaŭ ol forvojaĝi, glaciigu iom da akvo ene de eta botelo. En la tago de forveturo, metu la botelon en la frostujon. Okaze de elektro-interrompo, kiun kutime malfacilas ek-konscii je rehejmiĝo, la enhavo de gelos kaj poste reglaciigĝos horizontale anstataŭ vertikale.

Evidente indas, antaŭ ol forvojaĝi, elpreni la ŝuojn el la frostujo. Se ne, kaj se la elektro interrompiĝos, la maĉgumo denove fiksiĝos al la plandumo. Aŭ eble estus pli simple rezigni entute pri boteloj kaj frostujoj kaj, post

foresto for de la hejmo, kontroli elektran horloĝon por vidi, ĉu ĝi montras ankoraŭ la ĝustan horon. Nu, jen neavina konsilo.

Roberto PIGRO



ROYAL OLIVE

„Avinaj konsiloj” - malmultekostajn solvojn por la pli-malpli grandaj zorgoj de la ĉiutaga vivo.

## VIRINOJ

# Koalicia kompromiso

**L**a unua paŝo estas farita: la aŭstra koalicia registaro decidis enkonduki virinan kvoton por la estraroj de ŝtataj entreprenoj. Estontece 35 % de la estraranoj estu virinoj.

La Aŭstra Socialdemokrata Partio (ASP) postulis 40 %, la Aŭstra Popola Partio (APP) 30 % – sed fine, laŭ koalicia logiko, oni decidis pri 35 %. Tiom alta estu la proporcio de virinoj en la konsilioj de 55 ŝtataj entreprenoj. Nome temas pri entreprenoj, en kiuj la ŝtato havas financon intereson de pli ol 50 %. En 44 entreprenoj la ŝtato estas la solposedanto.

Disponeblas du jaroj por certigi kvaronon de virinoj en la estraroj. Ĝis 2018 la kvoto atingu 35 %. Se la entreprenoj ne plenumos tiun kvoton, sekvos sankcioj.

## Modelo

Gabriele Heinisch-Hosek (ASP), la ministrino pri virinoj kaj ŝtataj oficistoj, taksis la kvoton „bona vojo en ĝusta direkto”. Ŝi esperas, ke privataj firmaoj sekvos la modelon de la ŝtato. Ŝi diris:

„Hodiaŭ ni malfermis la pordon, ĉar pli da virinoj en gvida pozicio signifas ankaŭ pli larĝajn decidojn.”

Reinhold Mitterlehner (APP), la ministro pri ekonomio, estas kontenta. „Tio estas kompromiso. Mi opinias, ke

ni modele survojas.” Pli altan virinan kvoton li rifuzis. „El tio sekvas, ke, se la stereotipoj jam estas rompita, estos ankaŭ pli da virinoj en estraroj.”

Evgeni GEORGIEV



*Politikistoj Gabriele Heinisch-Hosek kaj Reinhold Mitterlehner bonvenigas la novan virino-kvoton.*



## INFANOJ

# Hela helpo

**E**n la albana ĉefurbo Tirano estas inaŭgurita nova servo por helpi infanojn perfortitajn, vagabondajn aŭ alimaniere marĝenigitajn.

La Hejmeto de la Koloroj estas starigita de la urbodomo de Tirano por servi infanojn, kiuj urĝe bezonas helpon. Inter ili estas romaaj infanoj, kiuj

estas lastatempe minacataj kaj devigataj forlasi provizoran loĝejon apud la urbocentro.

La „hejmeto” estas tagnokte malferma kaj povas subteni ĝis 100 infanojn per nutrado, vestaĵoj kaj medicinaj, klerigaj, juraj kaj aliaj servoj.

Bardhyl SELIMI

JAPANIO

# Frustrigo de marĝena suferanto

**La aŭtoro, Gotoo Hitosi, priskribas siajn travivaĵojn dum kaj post la tertremo kaj cunamo en Japanio.**

**L**a 11an de marto posttagmeze mi estis, kiel kutime, en la universitata oficejo en la kvara etaĝo. Je la 14a kaj 46 minutoj mi sentis tremetojn. Evidente temis pri komenciĝanta tertremo.

En la regiono de la pacifika bordo en nord-orienta Japanio oftas tertremoj. Estante denaska urbano de Sendai, mi ja al kutimiĝis al tertremoj, kiuj plej ofte okazigas nenion specialan. Efektive, du tagojn antaŭe, oni havis unu mezgrandan, sen videblaj damaĝoj. Malofte venas ja grandaj. En 1978 forta tertremo kaŭzis la morton de 28 personoj en Sendai kaj ĉirkaŭaj regionoj. La dato, la 12a de ju-

nio, restas neforgesebla por la urbo.

Jam antaŭe specialistoj prognozis, ke granda tertremo atakos la regionon kun probablo de 99 % iam dum la venontaj 30 jaroj. Homoj en ĉi tiu regiono bone konscias la aferon kaj preparis sin al estonta tertremo per diversaj rimedoj.

## Skuoj

La unuaj tremetoj sentiĝis pli kaj pli forte kaj daŭris longe. Mi provis malŝalti la komputilon por sekurigi la datumojn, kaj apenaŭ komplete malŝaltis, kiam komenciĝis la ĉefaj skuoj. Mi sentis,



*Dum la tertremo falis bretaroj kaj disŝetiĝis libroj.*

kvazaŭ la konstruaĵo dancus. Libroj lavange falis de la bretaroj kaj inundis la plankon ĝis miaj genuoj. La tremego daŭris minutojn kaj, kiam la tremego fariĝis malpli forta, mi elsaltis el la ĉambro en la koridoron.

En la studenta ĉambro la situacio estis malpli bona. La librobretaroj, alboltitaj al la muro, falis, disŝetinte librojn kaj gazetojn surplanken. Duonfalinta bretareto apogis sin al la pordo kaj baris ĝin. Mi vokis enen al la studentoj por certigi, ke neniu estas vundita, kaj kuraĝigis ilin eskapi. Ni kune fuĝis el la konstruaĵo kaj iris al vasta korto. Studentoj el eksterlando, precipe el Koreio kaj Ĉinio, estis palaj.

## Trankvilo

Iom post iom amasiĝis studentoj, instruistoj kaj oficistoj. Neniu ŝajnis vundita, kaj la konstruaĵoj ne aspektis difektitaj. Malproksime en la urbocentro vidiĝis domegoj, kiuj rekte staris kiel antaŭe. Nek aŭdiĝis sirenoj, nek vidiĝis fajro aŭ fumo. Bona signo! Kvankam intertempe ni sentis kelkfoje fortajn skuojn de la grundo, ni retrovis trankvilon.

Mi komence provis reiri hejmen per la aŭto kiel kutime, sed montriĝis, ke tio ne eblas, ĉar la trafiko estis kelkloke preskaŭ ŝtopita. Mi do lasis la aŭton en la parkumejo kaj piediris hejmen en unu horo.

Reveninte hejmen, mi retrovis ĉiujn familianojn bonfartaj kaj konstatis, ke ankaŭ la domo eltenis la tertremon,



*Aviadileto alteriĝis en nekutima loko – alia „viktimo” de la tertremo.*

kvankam ene estis tute kaose kaj kelkaj mebloj estas difektitaj. Mankis provizo de elektro, gaso kaj akvo, sed mi decidis ne evakuiĝi, sed resti hejme.

### Nuklea centralo

Telefono, hejma kaj poŝa, ne funkciis. En la mallumo ni aŭskultis radion kaj aŭdis raportojn ne nur pri la tertremo, sed ankaŭ pri 10-metra cunamo kaj akcidento en atomcentralo. Mi povis nur nebule supozi iel gravan damaĝon, sed tiam mi ne kapablis imagi pli konkrete. La sekvajn tagojn, sabate kaj dimanĉe, mi okupiĝis pri enmanigo de akvo, manĝaĵoj, hejtaĵoj kaj aliaj necesaj.

Nur kelkajn tagojn poste, kiam la elektro revenis, mi eksciis pli detale, ke la tertremo, multe pli intensa ol oni supozis, trafis preskaŭ la tutan orientan Japanion, ke la katastrofa cunamo kaŭzis tragedian damaĝon en la pacifika marbordo, forrabante eble dekmilojn da vivoj kaj sennombrajn proprietaĵojn, kaj eĉ plie kaŭzis seriozan akcidenton en la atomcentralo. Poste lokaj komunikiloj raportis, ke strukturaj difektoj en multaj konstruaĵoj en la urbo estas pli seriozaj ol laŭŝajne.

### Mesaĝoj

Kun elektro reestabliĝis la tele-

fona kaj reta konektoj. Mi interŝanĝis mesaĝojn kun lokaj kaj foraj amikoj kaj konstatis, ke neniuj el miaj parencoj, amikoj kaj konatoj estas forte trafita.

Laŭ la tempopaso mia ĉiutaga vivo iom post iom stabiliĝis, kvankam restas kelkaj maloportunaĵoj kaj tia situacio supozeble daŭros relative longe, ĉar ekzemple la kloaka sistemo tra la urbo suferis damaĝon. Samtempe la afero entute iel frustris min iom post iom.

Mi demandas min, ĉu mi estas viktimo. Mi hezitas jesi, ĉefe ĉar inter miaj parencoj kaj amikoj neniuj mortis pro la tertremo aŭ la cunamo, kaj materia perdo estas por mi malgranda. Kompare kun veraj viktimoj mi estas nur margena suferanto.

### Ruinoj

Mia frustrigo venas de la fakto, ke mi nun povas pasigi ĉiutagan vivon pli-malpli similan al la antaŭa, dum dek kilometrojn oriente, ĉe la marbordo en la sama urbo, kuŝas ebenaĵo de koto kaj ruinoj, kie pereis centoj da homoj. Kaj tiaj scenoj etendiĝas cent kilometrojn norden kaj suden laŭ la marbordo. Mi povas fari nenion alian ol spekti la scenon en la televido kaj preĝi por la veraj viktimoj. Tion mi nur malfacile povas kredi.

Mi mem ne estas homo speciale

orientita al la maro, kaj tamen mi konas kaj amas la belecon de la marbordoj de la regiono, jen rokecaj kaj krutaj, jen sablaj kaj glataj. Kiel averaĝa japano, mi ŝatas marajn manĝaĵojn: fiŝaĵojn, marfruktojn, marherbojn ktp. De tempo al tempo mi vizitis marbordajn urbetojn kaj vilaĝojn por ĝui la pejzaĝon kaj gustumi lokajn frandaĵojn. Mi ja iam kondukis eksterlandajn esperantistojn al la marbordo. Multaj lokoj estas por mi karmemoraj, sed la televido nun montras tute alian bildon ol tiu, kiun mi vidis iam.

### Vortaro

*La Esperanto-japana vortaro* (Japano Esperanto-Instituto, 2006), kiun mi kunredaktis, enhavas, sub la kapvorto „taksi”, ekzemplan frazon: „Ni ĝis nun subtaksis la danĝeron de cunamo”. Tiun ekzemplon mi mem enŝovis, aludante al la tertremo kaj cunamo en Sumatro en 2004. Mi devas konfesi, ke mi estis tiel stulta, ke mi maltrafis la veran signifon de tiu frazo.

Mi povas nun fari nur malmulton por la bono de veraj viktimoj, sed mi certe faros ion por ili. Mi ankaŭ esperas, ke multaj agos simile. Mi deziras nur, ke oni agu ne laŭ sia bontrovo de fore, sed laŭ loka bezono.

Gotoo Hitosi

### HOMAJ RAJTOJ

## Ne forgesitaj – post 50 jaroj

**L**a 28an de majo 1961 aperis en la brita ĵurnalo *The Observer* artikolo de Peter Benenson kun titolo *La forgesitaj malliberuloj*.

Temis pri alvoko agadi favore al ses prokonsciencaj malliberuloj. Al ĉi tiu idealisma faro de nur unu persono reagis homoj amase kaj mondscale. Jen la komenco de Amnestio Internacia.

Dum duonjarcento ne forestas gravaj „ sukcesoj ” de Amnestio Interna-

cia. Liberiĝis senkulpaj prizonuloj kaj mondscale estas reduktitaj mortpunoj. Sed la plej grava atingo eble estas tio, ke homoj, ordinaraj civitanoj, en pacama, neperforta maniero, povas efike kaj rezultodone unuiĝi kontraŭ maljusteco.

### Luktado

Kadre de la 50a datreveno de la starigo de Amnestio Internacia ankaŭ la membroj ludas centran rolon. Evidente,

ĉar estas la membroj, kiuj fortigas kaj vigligas la movadon en la luktado por homaj rajtoj.

Esenca por Amnestio Internacia estas la mondskala interligiteco de homoj. Interligiteco de membroj kun viktimoj de malrespekto al homaj rajtoj. Suf rantaj homoj, kiujn ili ne persone konas, kaj verŝajne neniam renkontos, sed kunhomoj. Tiu ĉi amasa konscio pri interligiteco kaj solidareco estas la ŝlosilo de la ĉie kreskanta influo de Amnestio Internacia.

La organizaĵo ege modeste celebras sian oran jubileon. Ĝi ja ne estas fondita por festi, sed por batali kaj labori. Helpo kaj subteno de Amnestio Internacia spertu ankaŭ de „nia diligenta kolegaro”.

Jacques TUINDER

MUZEOJ

# Vakso vokas ...



ANDREAS WENZEL

*La aŭstra prezidanto Heinz Fischer (dekstre) kun sia vaksa duoblulo.*

**E**n Vieno estis malfermita filio de la londona vaksfigura muzeo de Madame Tussaud. Ĝi estas la tria en Eŭropo post Amsterdamo kaj Berlino.

La aŭstra prezidanto Heinz Fischer inaŭguris la muzeon, kiu situas en la parko Prater. En ĝi estas prezentataj vivfidelaj kopioj de 65 aŭstraj kaj internacie konataj personoj. La prezidanto pozis

apud sia duoblulo el vakso, kiu surhavas malhelan kostumon.

En la muzeo troviĝas vaksfiguroj de la aŭstra imperiestra paro Franz Joseph kaj Elisabeth (Sissi), samkiel steluloj kiel la usonaj geaktoroj George Clooney kaj Angelina Jolie. Tie eblas vidi ankaŭ kopiojn de la usona prezidanto Barack Obama, la germana kancelierino Angela



ANDREAS WENZEL

Merkel, la modelino Heidi Klum kaj Papo Benedikto la 16a.


## Temhaloj

La pretigo de la vaksfigura muzeo daŭris du jarojn kaj duonon. Ĝi ampleksas areon de 2000 m<sup>2</sup> kaj kostis 8 milionojn da eŭroj. La muzeo konsistas el diversaj temhaloj: historio, muziko, filmo, sporto, politiko kaj viziuloj. Ĉiu vaksfiguro kostas 200 000 eŭrojn kaj la ellaboro daŭras de tri ĝis ses monatojn.

La elstaruloj ekspoziciotaj en la viena filio de la muzeo estis elektitaj post enketado inter vienanoj kaj ankaŭ eksterlandaj turistoj. Unu persono estis ege dezirata: Wolfgang Amadeus Mozart. Li estas menciita en ĉiuj enketiloj.

La viena filio de Madame Tussauds proponas ankaŭ interagajn ludojn. La vizitantoj povas ekzemple ludi pianon kun Franz Schubert, fari teston pri inteligenteco kun Albert Einstein aŭ fari dekunometran punŝoton kun la aŭstra futbalisto Hans Krankl. Krome estas permesite tuŝi la figurojn kaj esti fotata kun ili.

**Evgeni GEORGIEV**



**Artikolojn pri la vivo  
en via regiono sendu al  
[moderna\\_vivo@monato.net](mailto:moderna_vivo@monato.net)**

# Ludilmuzeo de Helsinko



*Hans. Käthe Kruse (1930, Germanio).*

**L**a ludilmuzeo de la finna ĉefurbo troviĝas sur unu el la insuloj Suomenlinna, kiuj situas antaŭ la haveno. La muzeo estas en romantika lignodomo, konstruita en la cara epoko komence de la 20a jarcento. Ĝi havas multege da eksponaĵoj de la 19a jarcento ĝis la 60aj jaroj de la 20a jarcento, inter ili 100 pluŝursojn.



*Ludilmuzeo de Helsinko.*

La ludiloj estas ordigitaj laŭ historiaj temoj kaj epokoj. Tiel speguliĝas ŝanĝoj en la socio kaj homa konduto. Pri milittempa malriĉo, mankoj kaj inventemo atestas kartonaj veturiloj, strobilaj bovinaj, paperaj pupoj, tabulludoj kun nomoj kiel „Batalo por Karelio” kaj „Lukto por nutrovaroj”. En familioj oni faris pupdomojn el fadenbobenoj, alumetskatoloj, ŝtofpecoj kaj alumina folio (por speguloj, fenestroj). Fine oni bruligis ilin en la korto, samkiel brulis la domoj post bombardado.

## Edukilo

En la 19a jarcento la celo de la plenkresk-aspekta bela pupo estis eduki honestajn virinojn kaj prepari knabinetojn por la estonta virina rolo de edzino, patrino, dommastrino. Oni edukis ankaŭ knabetojn per ludilarmiloj kiel soldatojn.

Nur en la 20a jarcento la infano mem komencis speguliĝi en la pupoj. Per la valoraj pupoj de la antaŭa jarcento oni eĉ ne rajtis ludi; ili estis faritaj por ad-



*Pluŝurso. Nalle Hultmann (1952, Germanio).*

miro kaj ornamo. En la 1950aj jaroj aperis tute alispekaj pupoj, kiujn oni unue malaprobis, ĉar ili aspektis kiel objektoj de seksa admiro. Oni nomis ilin Lilli en Germanio.

## Barbie

La Barbie-pupo unue estis talismano de vira klubo kaj nur poste ricevis sian nomon. Iom post iom ŝia vestaro plimultiĝis, kaj ĉiuspekaj akcesoraĵoj estis kreitaj por pliiĝi la vendadon. La Barbie-pupoj specialiĝis pri metioj kaj ek esprimis la idealojn de moderna virino.

La ludilmuzeo povas starigi pontojn inter la generacioj. Irante en ĝi de ejo al ejo kaj sekvanse temon post temo, oni povas rakonti kaj demandi pri la pasintaj kaj nunaj travivaĵoj, deziroj kaj sentoj.

Dek mil turistoj jare vizitas la ludilmuzeon de Helsinko. Somere ĝia korto estas disponigata por subĉielaj infanaj teatraĵetoj. Interreto: [www.lelumuseo.fi](http://www.lelumuseo.fi) (finne, svede, angle, ruse).

Saliko

# Moderna minaco: radioaktiveco

**Okaze de la natura katastrofo en Japanio – tertremego kun tuj posta cunamo – kaj la tuj sekvinta nuklea katastrofo en Fukuŝimo rezulte de la cunamo – ŝajnas esti necese iomete detali la radiadajn problemojn, kiujn la japanoj nun aldone alfrontas. Do kio estas radioaktiveco?**

## Alfa, beta, gama

De radioaktiveco estas tri ĉefaj specoj: alfa-radiado, beta-radiado kaj gama-radiado, nomitaj laŭ la unuaj tri literoj de la greka alfabeto.

Gama-radioj tre parenkas kun la iomete malpli danĝeraj tiel nomataj rentgenaj aŭ X-radioj. Temas pri speco de elektromagneta radiado, do jen survojas fotonoj. Gama-radioj penetras tra multaj materialoj. Por forŝirmi ilin necesas kelkcentimetra tavolo de plumbo. Sed ankaŭ betono sufiĉas, se ĝi havas dikon de kelkaj metroj.

Beta-radiado konsistas el rapidflu-

gaj elektronoj – kvankam iam kaj iam povos temi pri pozitronoj – kvazaŭ la malo de negative ŝargita elektrono. Tiuj estas pli grandaj kaj pezaj ol fotonoj, sed ili estas relative simple haltigeblaj. Por tio sufiĉas alumina folio el la kuir-rejo. Ankaŭ aero bremsas beta-radiadon – post kelkaj metroj.

Alfa-radiado konsistas el rapidflugaj atomkernoj de helio. Heliumon oni uzas en balonoj kaj eble tio sonas mal-multe danĝera. Sed nuda senelektrona nukleo kaj kompleta atomo estas du malsamaj aferoj. Fakte tiu ĉi speco de radiado estas la plej damaĝa al vivaĵoj.

Sed tre feliĉe, sufiĉas jam folio de papero por forŝirmi alfa-radiadon. Fakte sufiĉas jam la propra ekstera tavolo de la haŭto – do la morta tavolo. Sed se alfa-radiado tamen iel atingas vivantajn ĉelojn, ĝi estas la plej damaĝa radiado el la tri specoj. Tre feliĉe la aero mem bremsas alfa-radiadon post kelkaj centimetroj.


Propaĵo de kaj alfa- kaj beta-radiado, estas ke ĉe tio la radianta elemento transformiĝas en alian elementon. Ekzemple, jodo povas iĝi ksenono.

Tiel ne estas okaze de gama-radiado. Jen la elemento ne transformiĝas en alian. Fakte ĝia kerna energia stato ŝanĝiĝas.

## Unu, du, tri

De kie venas nun la radioaktiveco?

Ĉiu scias sendube, kio estas ĥemiaj elementoj. Temas pri la fundamentaj materialoj, el kiuj ĉio ĉirkaŭ ni estas farita. Homoj donas al ĉiu elemento ne nur nomon. Ĉiu elemento aldone de sciencistoj ricevis numeron komenciĝantan ĉe 1: 1 hidrogeno, 2 helio, 3 litio, 4 berilio, 5 boro, 6 karbono ktp, ĝis pli ol 100. Tiu ĉi numero estas fakte la nombro de la protonoj, kiuj troviĝas en ĉiuj kernoj de la atomoj de specifa elemento. Ekzemple atomo de oksigeno havas 8 protonojn en sia kerno, alinome nukleo. Atomo kun 8 protonoj havas normalokaze ankaŭ 8 elektronojn ekster la kerno ie en la spaco



*La bildo montras eblon de tri specoj de radioaktiveco penetri materialojn. Alfa-radiadon (α) eblas haltigi per folio de papero, beta-radiadon (β) - per aluminia folio. Por haltigi gama-radiadon (γ) bezonatas kelkcentimetra tavolo de plumbo.*

rekte ĉirkaŭ ĝi. Jen oksigeno.

Sed tio estas nur duono de la rakonto. En la kerno, do en la nukleo, troviĝas ankaŭ dua speco de nukleono. Apud la protonoj, kiujn ni jam konas, povas aldone troviĝi neŭtronoj. Oni eble menciui, ke protonoj havas pozitivan elektran ŝargon kaj ke elektronoj havas negativan elektran ŝargon. Sume – ekzemple en oksigeno – la 8 protonoj en la kerno kaj la 8 elektronoj ĉirkaŭ ĝi donas nulan ŝargon. La neŭtronoj, male, ne havas ŝargon. Tamen, same kiel protonoj, ili havas pezon. Do se specifa volumeno de oksigeno devus havi pezon de 1 kilogramo – laŭ sia nombro de la protonoj en ĉiu atomo – en la realo, ĝi pro la aldonaj neŭtronoj fakte havos pezon de preskaŭ 2 kilogramoj. Nome, ĉiu neŭtrono pezas preskaŭ same multe kiel protono.

Kiel dirite, la nombro de la protonoj difinas pri kiu ĥemia elemento temas. La nombro de la neŭtronoj aldone pezigas la elementon. En la naturo la nombro de neŭtronoj povas iomete variui. Oni diras, ke specifa elemento povas havi plurajn „izotopojn” – alivorte ĉiuj oksigenaj atomoj havas ja 8 protonojn, sed ne nepre la saman nombron da neŭtronoj. Ekzemple, ekzistas en la naturo oksigenoj kun 8, 9 kaj 10 neŭtronoj. Fakte oni adicias ĉiujn nukleonojn – do protonojn kaj neŭtronojn – kaj parolas pri la izotopoj oksigeno-16, oksigeno-17 kaj oksigeno-18.

## Kiel boligi akvon

Ne ĉiuj izotopoj de ĉiuj elementoj estas stabilaj. Ofte ne estas pli ol manpleno de stabilaj izotopoj eblaj. Se iel estiĝas izotopo, kiu ne estas stabila, ĝi disfalo. Ĉe tio ĝi ĉiam perdos ion kaj transformiĝos en alian elementon kun alia nombro da protonoj – iam pli, iam malpli. Tio povas okazi tuj, tio povas okaze kure de jarmiloj – depende de la elemento kaj de la specifa nestabila izotopo. Dum tiu ĉi disfala procezo ĝi dissendas alfa- aŭ beta-radiojn; alivorte, ĝi estas radioaktiva – aŭ alfe, aŭ bete. Aldone, la rezultantaj elementoj de tia alfa- aŭ beta-disfalo povas dissendiĝi kiel gama-radioj. Ĉe ĉio ĉi samtempe

povas estiĝi varmego.

La principo de nuklea elektrejo baze de atomkerna disfendiĝo estas preni specifan izotopon de uranio, kiun oni povas disfali, kaj ĉe tio eĉ aldone disfendi, kaj per la estiĝanta varmego de la estiĝintaj produktoj de la disiĝo boligi akvon por peli turbinon, kiu generas elektron. Fakte la produktoj de la disiĝo hejtas la akvon, ne la deirbaza uranio mem.

Bedaŭrinde la disfalo ne nur produktas varmon, ĝi produktas ankaŭ radioaktivecon kaj aldone la disfalaĵoj produktoj – kvazaŭ la atomoj de uranio meze distranĉitaj – mem estas nestabilaj izotopoj, kiuj same per si mem radioaktivaj.

## Vento ne blovu

Estas nun du danĝeroj:

Unue, mi starigu min rekte apud la disfalanta varmega uranio. Aparte de la varmego, la gama-radiado tuj mortigos min.

Due, mi starigu min unu kilometron for de la disfalanta uranio, eble aldone malantaŭ dika muro. La gama-radiado ne plu atingos min sufiĉe forte por mortigi min. Same kiel lumo, ĝi des pli malfortiĝas, ju pli oni forigas sin de la fonto. Precize tiel statas ankaŭ rilate gama-radiadon. Do mi troviĝas unua-

vide en sekureco. Mi estas sufiĉe for.

Sed se tiam ekestos forta vento kaj se komencos pluvi, jen mia pereco. Se la vento kunblovos ion ajn el la kaldrono, kie bele boligas mia uranio akvon, iuj erojn de la brulaĵo mi sendube enspiros. Se mi nun ĝuste plukas pomon de la pomujo apud mi, kaj komencos manĝi ĝin, mi same kunmanĝos iujn forportaĵojn.

Jen eĉ distance same mia fino, ĉar nun mi havos iujn ne stabilajn izotopojn de io ajn rekte en mia korpo. Tiuj nun priradios min de interne per alfa-kaj beta-radioj, ege danĝeraj por mi. Kaj same pri gama-radiado, kiu nun ne plu estas ie unu kilometron for. Ankaŭ la gama-radiantaj materialoj estas jam en miaj pulmoj kaj en mia stomako. La radiado kaŭzos mutaciojn de la genoj de miaj ĉeloj. Ili ne plu laŭplane disdividiĝos. Ĝuste tiel estiĝas tumoraj ĉeloj – do kancero. Aldone mi prefere ne plu generu idon. Ankaŭ ties genoj de mi transdonitaj povos esti difektitaj.

## Ŝirmu bone

Evidente – oni ne disfaliĝu uranion por boligi akvon por produkti elektron en plena aero. Oni bezonas specon de ŝtala vaporkaldrono ĉirkaŭ ĝi. Oni aldone atentu pri tio, ke la tuta ekipaĵo ne ellasu gama-radiadon kaj aldone ĝi ne ellasu eĉ nur unu eron de la radioakti-



Menciindas, ke post la katastrofo de Ĉernobilo, la vento portis radioaktivaĵojn al Bavario en Germanio. Tiuj koncentriĝis en la fungoj kaj en ties radikaro.

vaj materialoj, ĉu antaŭe ekzistantaj, ĉu estigitaj de la disfala procezo.

Plie estas problemo pri uraniaj stangoj aŭ buloj, kiuj estas jam plene eluzitaj. Bedaŭrinde ili plu radias kaj plu varmegas eĉ post sia uzo. Fakte sen malvarmigado ili rekomencas aktivi. Same pri la situacio post la malŝalto de elektrejo. La uraniaĵoj en la vaporkaldrono devas esti malvarmigataj por malhelpi reaktiviĝon. Iam la eluzitaj stangoj povas esti pli danĝeraj ol la ne-uzitaj – ili entenas ankaŭ radioaktivajn produktaĵojn de la disfala procezo.

## „Apro laŭ bavara maniero”

Menciindas, ke post la katastrofo de Ĉernobilo, la vento portis radioaktivaĵojn al Bavario en Germanio. Tiuj koncentriĝis en la fungoj kaj en ties radikaro. Aproj ŝatas manĝi fungojn. Eĉ ĝis hodiaŭ, 25 jarojn pli poste, ĉasistoj ne plu povas manĝi la viandon de la aproj, kiujn ili mortpafas. La viando estas tro kontaĝita per radioaktivaĵoj. Oni devas forĵeti la viandon.

Ĉiuspeca alfa-, beta- aŭ gama-radiado en ĉiu ajn dozo generas kanceron kaj mutacias genojn. Estas simple tiel, ke rilate malgrandajn dozojn la organismo plej ofte kapablas ripari la damaĝon. Do sume statas tiel, ke ju pli granda la dozo, des pli verŝajne kaj des pli baldaŭ oni malsaniĝos.

Cetere, specifgradan ne tre altan oftecon de mutacio de genoj oni povas ankaŭ pritrakti avantaĝa por la laŭ-darvina evoluado.

En la kazo de enkorpigitaĵ radioaktivaĵoj estas menciinde, ke la homakorpo koncentros la radioaktivaĵojn ene de si. Kie tio okazos, dependas de la elemento enkorpigita. Ekzemple jodo koncentriĝas en la tiroido. Ĝuste la radioaktiva izotopo de jodo – la tiel nomata jodo-131 – troviĝas en la aero ĉirkaŭ Fukuŝimo kaj novdate eĉ en la trinkakvo de Tokio.

Pro tio oni prenas tablojdojn por klopodi bloki la jodsorbemon de la tiroido, ĉar feliĉe malstabla jodo-131 disfalas al stabla ksenono-131 duone ene de 8 tagoj. Bonan apetiton!

## Fukuŝimo

En Fukuŝimo estas jam ĉio samtempe. Uranio estas ne plu ŝirmita, same pri la disfalaj produktoj. La tuto ne plu estas malvarmigata. Aldone, eluzitaj uraniaj stangoj ne plu estas sub malvarmiganta akvo kun aldono de boro kiel ŝirmilo.

Loke, ĉe la elektrejo, la rekta gama-radiado povas mortigi ĉiun, kiu, ne ŝirmata, estas tro proksima al la ruinoj kaj volas eble ripari ion.

Oni kiel rezerva malvarmiga strategio iomete de fore ŝprucigis marakvon en la ruinojn. La alpumpita marakvo evidente devas reflui. Tiu ĉi reflua akvo nun kunportas radioaktivajn materialojn el la difektita kaj ne plu sigelita reaktoro. Aldone vento kaj pluvo simile forportas radioaktivaĵojn.

Ĝis nun la japanoj havis bonŝancon en sia malbonŝanco. La vento blovis preskaŭ ĉiujn radioaktivaĵojn al Pacifiko. Samdirekte refluis la marakvo uzata por klopodi malvarmigi ĉion. Do la fiŝoj nun suferas. Aldone, ĉirkaŭ la reaktoro, ĉiuj plantoj nun portas tavolon de radioaktivaĵoj.

Ĉiuj radioaktivaĵoj, kiuj nun liberiĝis, radias. Kelkaj radios nur dum kelkaj semajnoj, kelkaj radios praktike ĉiam.

Pro tio, ke Tokio ne estu minacata, la vento nepre ne blovu de nordo. Ĝisdate la tokianoj havis bonŝancon. Pri la estonto oni povas nur esperi.

Estonte estas tamen unu afero jam certa. La marbestojn el la proksima Pacifiko kaj la plantojn el la provinco Fukuŝimo oni evidente ne plu manĝu.

## Kiom da sivertoj?

La danĝereco de dozo de radioaktiveco por organismoj – ĉu alfa, beta aŭ gama – oni mezuras laŭ sivertoj – kun la simbolo Sv. Evidente ekzistas milisiverto (mSv), mikrosiverto (μSv) kaj nanosiverto (nSv). Oni tamen ĉe tio ne forgesu, ke dozoj akumuliĝas. Homo normalokaze ricevas dozon de 2 mSv ĉiun jaron. Ĝi venas de ĉie – el la kosmo, el la tero, eĉ el bananoj.

La plej konata mezurilo estas eble la geĝera nombro. Reage al radiado

– almenaŭ gama-radiado – ĝi klakas. Ĉe tio rilate al beta- kaj gama-radiado 100 klakoj en minuto egalas – iomete depende de la geĝerilo – al dozo de 1 μSv ĉiun horon. Ĉe tio oni notu, ke, se la 100 klakoj ĉiuminutaj devenas nur de alfa-radiado, la efiko estas dudekoble pli alta – nome jen 20 μSv ĉiun horon. Do alfa-radiado estas dudekoble pli danĝera, kvankam ege pli facile forŝirmebla – paperfolio sufiĉas.

Ne ĉiu geĝera nombro kapablas detekti alfa- aŭ beta-radiadon. Por tio ĝi devas havi specialan fenestron el materialo, kiu ne forŝirmas ĝin.

Hejme, geĝerilo klakos espereble ne je 100 klakoj, sed je nur 18 klakoj en minuto. Jen radiado liveranta dozon de proksimume 180 nSv hore, kio egalas al proksimume 1,6 mSv dum jaro. Jen normala fonradiada situacio. Fakte suma dozo de malpli ol 2 mSv en jaro estas normala.

## Ĉiujara dozo

Oni taksas, ke longdaŭra eksponiĝado al radiado efikas jene:

| Dozo    | Efiko          |
|---------|----------------|
| 2 mSv   | senproblema    |
| 100 mSv | eble kanceriga |
| 200 mSv | kanceriga      |

## Unufrapa dozo

Oni taksas, ke tuja, pli-malpli unufrapa dozo da radiado efikas jene:

| Dozo    | Efiko                    |
|---------|--------------------------|
| 400 mSv | danĝerega                |
| 2 Sv    | ne ĉiam kuracebla        |
| 4 Sv    | preskaŭ neniam kuracebla |
| 8 Sv    | mortiga                  |

Bonvolu noti, ke la dozlimoj donitaj estas disputeblaj kaj fakte estas multe diskutataj.

PEJNO Simono

# Fondaĵo „E-vid-E-nt-E” jam 45 jarojn aktivadas

En la komenco de la jaro 1966 mi trovis informilon en mia poŝtkesto, kiu post legado kaj pripensado esence influis mian ceteran vivohistorion. Ĝin sendis organizaĵo, kies ĉefa celo estas batali kontraŭ la tiel nomata „nenecesa” vid-handikapeco. El ĝi mi ekkomprenis, ke en nia mondo vivas milionoj da blinduloj, kiuj povus ĉiumatene ĝui la miraklan sunleviĝon, se por ili prezentiĝus helpo oftalmologia. Sur mian koron marteladis la manro, ke tri el kvar nevidantoj estas eviteble – ĉu preventive, ĉu kurace – vid-handikapitaj. Eblis per simbola modesta monsumo helpi al afrikaj okulpacientoj, ĉefe kataraktuloj, per operacio.

## Agado E3

Mia edzino Vera kaj mi decidis „adopti” kelke da pacientoj en Kenjo kaj ankaŭ varbi pliajn adoptontojn inter parencoj, amikoj, najbaroj, kolegoj ktp. Kaj danke al la ĉielo ni havis sufiĉe da sukceso. Tio kondukis nin al la iniciato propagandi tiun valoran agadon ankaŭ inter „nia diligenta kolegaro”, kiu „en laboro paca ne laciĝas”. La bonan lingvon ja kreis okulisto, kiu krome ligis belan idealon, valoran ideon kun sia spirita infano. Tamen, laŭ ni la tiel nomata „interna ideo” ne restu tro interna kaj abstrakta, sed „eksteriĝu”, ekzemple per servado al blindaj kaj malforte vidantaj homoj. Malmultaj esperantistoj scias, ke unu tagon en la semajno Zamenhof, kiu tre forte nin inspiradis, kuracis siajn plej malriĉajn pacientojn plene senhonorarie. Tiel en novembro 1966 aŭdiĝis en la Esperanto-gazetaro la alvoko: „Esperantistoj, esperigu esperantojn”,

per kio naskiĝis Agado E3. Kio ja estas pli bona kaj bela ol doni lumon al tiuj, kiuj ade, sed tute senbezone, vivas en eterna nokto?

La iniciatinto spertis, ke estas treege malfacile malfermi okulojn de niaj samideanoj antaŭ tiu giganta mondproblemo. Propagandante en propra rondo li do perdis multe da tempo, energio kaj mono, kiujn li prefere utiligu favore al okulpacientoj en ekonomie malfortaj landoj. Post 25-jara agado li decidis limigi sin al sialandaj helpantoj kaj serĉi kolegon, kiu havas evidentan talenton sukcese heroldi inter alilandanoj kaj do „fiŝkapti” en verdstelaj akvoj. Post dudeko da jaroj tiu persono bedaŭrinde

ankoraŭ ne anoncis sin. En la periodo 1966-1991 la projektoj grandparte limiĝis al Afriko, nome al Kenjo kaj Malavio (veturantaj okulklinikoj), Kamerunio (40-lita okulkuracohospitalo), Ganao (optikejo), Maroko, Sud-Afriko kaj Tanzanio (okulkuraca instrumentaro). Poste aldoniĝis Albanio, Bulgario, Kosovo, Moldavio, Rumanio, Rusio, Barato, Srilanko kaj Taĝikio.

## Nova nomo

En 1997 la nomo de la kampanjo alibaptiĝis en Nederlando kiel *Stichting Zienderogen* (kun e-e-e), kaj ekster la nederlandaj landlimoj ĝi konatiĝis kiel



*Karakterizas nian fondaĵon, ke ĉiuj donacoj kaj subvencioj fluas rekte kaj integre al la projektoj kaj ke deĵoras ekskluzive volontuloj.*



Fondaĵo Evidente (*Eye-Care Foundation*, ankaŭ kun e-e-e). Karakterizas nian fondaĵon, ke ĉiuj donacoj kaj subvencioj fluas rekte kaj integre al la projektoj kaj ke deĵoras ekskluzive volontuloj. Neniu ricevas pagon por sia laboro! Kromajn kostojn (varbado, papero, poŝtmarkoj, telefono, transporto ktp.) pagas, kiel lian kontribuon, la poŝto de la iniciatinto, kiu plenumis sian taskon en liberaj, eksterprofesiaj horoj. La plej gravaj laborteroj jenas: misioj kun okulistoj kaj optikistoj, instruado al infanoj vidhandikapitaj, rekapablado kaj logado. La helpo estas direktata al la plejmalriĉuloj; ni do laboras inter ciganoj, vivaĉantoj sur rubodeponejoj, inter prizonuloj en malliberejoj, en flegejoj por handikapitoj kaj pliaĝuloj, infanhejmoj kaj orfejoj, institucioj por infanoj malforte vidantaj kaj surdaj, hejmoj por eksaj infansoldatoj, socialaj entreprenoj, psikiatriaj klinikoj ktp. Ĉiam oficiale invitas nin asocio por vidhandikapitoj, kiu faras por ni programon kaj sub kies respondecas ni

praktikas por eviti panŝteladon al lokaj specialistoj.

Dum la pasinta jaro libervoluloj de „Evidente” vizitis la jenajn landojn: Sri-lanko (februaro), Maŭritanio (marto), Ukrainio (aprilo), Maroko (julio), Kongo (septembro) kaj Rusio (novembro). Ne malofte invitoj atingas la kunordiganton pere de esperantistoj, kaj en tiuj landoj sekve okazas – kadre de nia ĉeesto – agrablaj kaj fruktodonaj renkontiĝoj kun Esperanto-klubo (Kongo, Kaŭkazio, Kaliningrado, Krimeo ktp). Regule ili asistas dum nia laboro, akompanante kaj tradukante. En 2010 ni servis al ĉirkaŭ tri mil personoj per laŭreceptaj okulvitroj! Kiam ni deĵoris en Kaliningrado, la nederlanda okulisto, kiun mi en 1979 ekkonis en Kamerunio, tre miris, ke apenaŭ unu kolego komprenas la anglanlingvon. Tiogravemalfaciligis lian taskon fake krominstrui studentojn kaj jamajn oftalmologojn ...

La nunan jaron okulisto kaj kvar optikistoj vojaĝis al Maŭritanio por pre-

pari gravan projekton (marto) kaj sep optikistoj vizitis okcidentan Ukrainion por starigi optikejojn (aprilo). Dume ni ricevis inviton de esperantisto en Mwanza (Tanzanio), kiu zorgis pri oficiala invito de la asocio de vidhandikapitoj, kaj tio ebligis novan mision en la venonta junio. Sekvos en oktobro misio al Gambio. Plurajn invitojn ni estonte atendas el la vasta Rusio.

## Stafeta transdono

En la pasinta januaro la iniciatinto de „Evidente” atingis la aĝon de 78 jaroj, kaj li ekopinias, ke venis la tempo por transdoni la daŭre kreskantan taskaron. Aliaj daŭrigu lian agadon, kaj tio signifas, ke tiam Esperanto ne plu ludos centran rolon, ĉar neniu nuna kaj morgaŭa estrarano scipovas ĝin. Ĉiam mi havis multe da kontaktoj kun blinduloj kaj surdoblinduloj pere de la brajloskribo. Mi esperas, ke almenaŭ unu estrarano ĝin lernos, sed la korespondo ĝenerale fariĝas en ... Esperanto. En la daŭro de la tempo ni finance adoptis blindajn infanojn en Kongo, Maroko, Maŭritanio kaj Rumanio. Tiu devigo daŭros ankaŭ dum la venontaj jaroj; por tio ni do aranĝis financon rezervon.

Kore mi dankas al porblindulaj organizaĵoj, servoklubo, revendejoj, nia komunumo, ekleziaj komunumoj kaj monaĥejoj ktp pro la granda subteno, kiun ili dum dekoj da jaroj malavare donis al nia kampanjo. Kompreneble varman kaj sinceran dankon ankaŭ al ĉiuj fidelaj samideanoj. Ofte mi ricevis leterojn, en kiuj oni nomis min „nobla homo”, kiu „faras laŭdindan laboron” ... Ĉu estas pliaj homoj noblaj kaj laŭdinde laborantaj?

Jacques TUINDER

Jacques Tuinder estas prezidanto de Fondaĵo Evidente, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando.  
zienderogen@casema.nl,  
www.stichtingzienderogen.nl



Bildstrioj estas amuzaj. Ĉu tio signifas, ke ili ne estas praktike utilaj? Bildrakontoj plaĉas al infanoj. Ĉu do ni pensu, ke ili ne taŭgas por plenkreskuloj?

Evidente ne! – jen la respondo, kiun sugestas la 32-paĝa instruhelpilo de Michel Dechy *La bildstrioj kiel lernolibroj*.

Ĉu vi konas la serion pri Tinĉjo, kiun lanĉis la fama belga desegnisto Hergé? Verŝajne, jes – ja pli ol 200 milionoj da ekzempleroj estas venditaj tutmonde en pli ol 60 lingvoj! Tri el la bildstrioj jam aperis ankaŭ en Esperanto: *La krabo kun oraj pinĉiloj*, *La nigra insulo* kaj *Tinĉjo*

# Instrua, instiga, inspira!

*en Tibeto*. En sia libro Dechy prezentas fragmentojn el la esperantigitaj rakontoj kaj koncizan enhavresumon de ĉiuj 24 albumoj, aperintaj ĝis la jaro 2004.

La celo de *La bildstrioj kiel lernolibroj* estas paroligi Esperanto-lernantojn pri temoj, ĉerpitaj el la aventuroj de Tinĉjo. Depende de ilia nivelo eblas priskribi bildojn, babili pri simplaj ĉiutagaj aferoj aŭ pridiskuti gravajn sociajn problemojn. Ekzemple, al Esperanto-komencantoj oni povas montri bildon kaj demandi: „Kiu li estas?“, „Kio li estas?“, „Kion li faras?“ ktp. Kun progresintoj, tamen, eblas paroli pri malpermeso de fumado en publikaj lokoj, pri etnaj konfliktoj en Tibeto k.s.

La diversnivela ekzerc-ekzemploj estas elstarigitaj per diverskolora fono – la blua emfazas la malpli facilajn. En flavaj rektanguloj aperas aldonaj informoj pri Hergé kaj liaj verkoj. Ankaŭ

el tio eblas ĉerpi ekzerc- kaj diskutemojn.


La 32 grandformataj kaj plenkoloraj paĝoj aspektas bele. Jen unu el la multaj instruhelpiloj, kiun Esperanto-lernantoj povas fieri montri al geamikoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj same ŝatus eklerni la lingvon internacian.

Eble nelaste pro sia alloga aspekto *La bildstrioj kiel lernolibroj* vekis en mi multajn ideojn pri utiligo de bildstrioj en Esperanto-instruado kaj inspiris min pri iuj eksperimentoj. Espereble ankaŭ aliaj instruantoj same trovos la libreton ne nur instrua kaj instiga, sed ankaŭ inspira.

Mariana EVLOGIEVA

Michel Dechy: *La bildstrioj kiel lernolibroj*. Eld. La aŭtoro, Villeneuve-d'Ascq, 2010. 32 paĝoj broŝuritaj.

Prezo ĉe FEL: 6 eŭroj + afranko



## Kiel Vaglummo

Willem Elsschot

Antaŭ 50 jaroj mortis Willem Elsschot, unu el la plej famaj flandraj verkistoj de la pasinta jarcento. Okaze de tiu jubileo, Flandra Esperanto-Ligo eldonis la verkon “Kiel Vaglummo” (Het dwaallicht) en traduko de Bert Boon.

“Kiel Vaglummo” estas aspekte maldika libro 56-paĝa, sed enhave ĝi estas novelo plurtavola ... La tavoloj sin kaŝas, ĝis la leganto atingas iun tavoloŝlosilon, kiun li nur per tre atenta legado malkovros.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 56 paĝoj,

ISBN: 978-90-77066-45-4;

prezo ĉe FEL: 10,00 EUR + afranko.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, Antwerpen, Belgio.

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# Socia dokumento pri nia larmovaldo


**A**ntaŭ proksimume unu jaro mi recenzis la unuan libron de Eddy Raats, *La longa vojaĝo – Travivaĵoj de etulo*. Mi vidis en ĝi esperantan ekvivalenton, almenaŭ en have, ne literature, de la Kisinskia *La Farbita Birdo*. Mi notis en la fino de mia teksto, ke la libro gustas je pli. Kaj nun mi estas regalata de tiu plio. Ĝus aperis la daŭrigo de la vivorakonto de Eddy.

## La bona malnova tempo

Ankaŭ en Esperanto ekzistas, kaj eĉ estas zamenhofa, tiu idilia nostalgia kaj idealiga esprimo. Se mi, tamen, pripensas la ne tre oftajn rakontojn de miaj gepatroj pri ilia juneco, tiam mi konstatas, ke plej granda parto el tiuj rakontoj temis pri malriĉeco, pri mizero, pri krudeco, pri dronigo de mizero en alkoholon. Miaj gepatroj profitis, mi supozas, de la evoluo de nia socio, de la aliaj tempoj, de la „nova tempo”, kiu alportis *aliajn morojn*. Ili estis, en mia familio, la unua generacio, kiu liberigis sin el la kotaro ... sed en sia juneco ili ankoraŭ turniĝadis en ĝi. El la nova libro de Eddy mi lernis, ke ne ĉiu familio same rapide kaj facile evoluis ... kaj plie danke al ĝi, mi nun pli klare rimarkas, ke ankoraŭ nun, ĉe ni, en nia skandale riĉa socio, iuj familioj daŭre vivas en kotaro.

## Pendis sur hareto

Jen alia zamenhofa esprimo, kiu ilustrigas en la libreto! Eddy pentras la verŝajne plej krizan okazintaĵon en sia vivo, tiom krizan, ke la detaloj neniam sukcesis enskribiĝi en liaj cerbaj kurbiĝoj. Li preskaŭ strangolis la duan edzon de la patrino. Kiel estus estinta lia vivo, se la atestantoj ne estus forŝirintaj



liajn manojn duonrompiĝintajn for de la premita kolo? Fakte, du vivoj saviĝis, kaj ambaŭ pendis sur hareto! Kaj je via miro vi en la fino de la libreto konstatos, ke Eddy bone zorgis la saman viron dum liaj finaj vivojaroj. Mi eĉ havas la impreson, ke li pli milde juĝas tiun viron ol sian propran patrinon. Eddy nepre ne sekvis la ĝeneralan regulon, ke *se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas*, kaj li ankaŭ pravas, ke oni ne devas esti profunde religiema por *ami la proksimulojn kaj pardoni kulpulojn*.

## Eksplodliberiga kortobalaĵo

La Krio de E. Munch ofte aperis antaŭ miaj mensaj okuloj dum la legado. Ĉu la verkado eble estis, eĉ se nekonscie, finfina elŝrikado de dum multaj jaroj forpuŝita sufero? Ĉu pro tio la aŭtoro neglektas la valoran konsilon *ne porti*

*eksteren balaĵon el korto*? Mi supozas, ke jes. Kaj se ni scias, ke malgraŭ ĉiaj malhelpoj la aŭtoro sukcesis vivi sufiĉe luksan okcidentan vivon, oni nepre demandas sin, kial iuj aliaj en la libro, kiuj havis pli promesan komencan kapitalon, kontraŭe ĝisfunde enkotigis sin mem!

Relativeco de etiko montriĝas en la priskribo de la pia, laŭinde hipokrita, maniero, en kiu Eddy sukcesis prizorgi sian edukadon. Puŝis lin instruisto, kiu dankis sian instruitecon al same pia ruzaĵo, per taŭga, zorga kaj logika klarigo de severa kateĥismo ... kaj de la jezuita principo *la celo pravigas la rimedojn*. Plie helpis la pragmata *inter lupoj, krii lupe!*. Tia agado en nia nuna tempo neniel estas miriga, sed ne forgesu, ke tiam estis *alia tempo, alia moro!*

## Alia lando, alia moro

Kune kun sia antaŭulo la libreto estas vere socia dokumento ... tia, kiaj troviĝas jam en nia literaturo, sed estus utile, se ili multiĝus. Antaŭ nelonge aperis tia dokumento pri la patrino de Sen Rodin. Ne temas pri altaj literaturaj ĉefverkoj, sed pri honestaj, liberaj, kuraĝaj korelverŝoj. Ili ankaŭ instruas al ni, se ni bone legas niajn ĵurnalojn kaj bone rigardas la novaĵelsendojn de televido ... ke ekzistas landoj kaj situacioj, kie homoj ankoraŭ nun travivas tempojn similajn al niaj *bonaj malnovaj!*

Petro DE SMEDT

Eddy Raats: *Post la pluvo – pluvego. Travivaĵoj de junulo*. Eld. Monda Asembleo Socia, 2010. 126 paĝoj gluitaj. ISBN 978 2 918300 34 2.

Prezo ĉe FEL: 12,80 eŭroj + aŭfranko.

# Utimura Kanzo antaŭ 150 jaroj naskiĝis



KIMURA GORO CHRISTOPH

*Utimura Kanzo, unu el la plej influhavaj pensantoj kaj sociaj agantoj en la moderna Japanio.*

**R**ilate kristanismon konstateblas interesa misproporcio en Japanio: Nur ĉirkaŭ 1 % de la japanoj estas kristanoj, sed ĉirkaŭ 70 % de la geedziĝaj ceremonioj kristanisme okazas (laŭ statistiko en 2007), kaj granda plimulto, por ne diri preskaŭ ĉiuj, precipe en la juna generacio, kristnaskon „festas”. Tiun fenomenon oni povas kompreni rilate al la imago de kristanismo en Japanio. La kristana kredo venis al Japanio el Okcidento, el Eŭropo kaj Usono. Kaj ĝis nun ĝi estas perceptata kiel parto de eŭropeco. Oni volonte alprenas kelkajn allogajn erojn, kiel japanoj faris ankaŭ pri aliaj okcidentaĵoj. Tamen la kerna mesaĝo restas io fremda por la plimulto

de la japanoj. Ankaŭ la kristanoj mem ofte akceptis sian kredon kiel okcidentdevenan, alprenante okcidentajn organizformojn kaj konstrustilojn de preĝejoj. Ankaŭ lingve preĝejoj ofte funkcias kiel misiejoj de Okcidento, proponante kursojn de la angla, franca, germana ktp.

Eblon de alia aliro al la okcidentdevena kristanismo montris Utimura Kanzo (Uĉimura Kanzo, li mem subskribis kiel Kanzo Uchimura, 1861-03-26/1930.03.28), unika kaj unu el la plej influhavaj pensantoj kaj sociaj agantoj en la moderna Japanio. Tute male al la tiam (kaj nuna) ĝenerala japana tendenco adori la okcidentan civilizon kaj rifuzi la kristanan kredon, surbaze de la kristana kredo li ne nur severe kritikis la tiaman japanan socian malegalecon kaj militisman politikon, sed ankaŭ la okcidentan modernan civilizon.

## Kristaniĝo de Utimura

Utimura estis unu el kelkdeko da lernantoj ĉe la agrikultura lernejo en Sapporo, kiuj akceptis la kristanan kredon sub la influo de William S. Clark, usonano invitita al Japanio en 1876 por instrui la modernan agrikulturon. Inter kristaniĝintaj samklasanoj de Utimura internacie plej famas Nitobe Inazo, posta vic-ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj, kun kiu Utimura dum sia tuta vivo restis en amikaj rilatoj.

Komence Utimura akceptis kristanismon kiel parton de la okcidenta civilizo. Sed liaj spertoj en Usono (1884-1888), kien li iris por serĉi en „kristana lando” internan savon, ŝanĝis lian sintenon. En Usono li renkontis sincerajn kristanojn,

kiuj helpis profundigi lian kristanan kredon. Sed aliflanke li ankaŭ observis, kiel facilanima la kristanismo estas de la ĝenerala usona socio. Li travidis, ke harmonio inter kristana kredo kaj okcidenta civilizo estas nur surfaca. Li konstatis, ke ju pli oni mergiĝas en la okcidentan materialisman kaj memcentrisman civilizon, des pli malfacilas akcepti Jesuon. La komence intima rilatigo inter Okcidento kaj kristanismo en li disfalis. Li ekperceptis kristanismon kiel origine orientan kredon. Poste li skribis, ke la grandaj mondreligioj budhisma, kristana kaj islama fontas ĉiuj en azia spiriteco.

## Inter Jesuo kaj Japanio

Reveninte al Japanio, li komencis sian agadon kiel kristano-patrioto. Lia devizo jenis: „Mi por Japanio; Japanio por la mondo; la mondo por Kristo; kaj ĉio por Dio.” Sian kredon li mem komprenis kiel ovalon kun du fokuso: Jesuo kaj Japanio. La rilaton inter ambaŭ de li amataj du *J*-oj li jene priskribis:

„Jesuo mian amon al Japanio fortigas kaj purigas. Kaj Japanio mian amon al Jesuo konkretigas kaj celon donas.”

Sed tiujn du *J*-ojn harmoniigi ege malfacilis en tiutempa Japanio. Post reveno el Usono, Utimura iĝis instruisto en kristana lernejo. Sed tie lin ĝenis la konduto de la okcidentaj misiistoj, kiuj kvazaŭ desupre al japanoj rigardis kaj (laŭ li) arogante kondutis. Ĉi tie ni citu tekston, kie li kritikis prilingvajn sintenojn de kelkaj misiistoj:

„Ni konas anglajn kaj usonajn misiistojn, kiuj loĝante en Japanio 20 jarojn, 30 jarojn, 40 jarojn eĉ ne kapablas res-

pektinde paroli la japanan lingvon. En interparolo kun ni ili libere kaj senĝene uzas sian propran reĝan aŭ jankian anglan, kvazaŭ la angla estus oficiala lingvo de Japanio. Japanlingva legkapablo de misiistoj preskaŭ nulas. La fakto, ke misiistoj ne sentas la japanan valoron por ellerni, klare pruvas, ke niajn animojn ili ne vere amas.”

Li en tiu lernejo ĉesis labori kaj en ŝtata lernejo instruistiĝis (1891). Tamen tie li dum ceremonio rifuzis profunde kapklini al mesaĝdokumento de la imperiestro, ĉar tiun ceremonieron kiel religian adoron li sentis kiel malkongruan kun lia kristana kredo. Pro tio li ankaŭ tiun laboron devis ĉesigi.

Sian situacion kaj starpunkton li jene priskribis:

„Mi ne scias, kiun mi pli multe amas, ĉu Jesuon aŭ Japanion. Pro Jesuo miaj

samlandanoj min malamas nomante min kristanaĉo. Kaj pro Japanio alilandaj misiistoj malŝatas min, deklarante min obstina naciisto. Sed ne ĝenas min. Eĉ se mi perdus ĉiujn amikojn, mi ne povas perdi Jesuon kaj Japanion.”

Laŭ tiu starpunkto sian agadon kiel ĵurnalisto li rekomencis, sociajn maljustecojn akuzante kaj japanan militismon kritikante. Pri milito li komence kredis je la bona intenco de la japana registaro liberigi Azion, sed poste li travidis, ke Japanio fakte nur imitas la okcidentan imperiismon. Kaj kontraŭe al la ĝenerala eŭforio en la tiama Japanio pri la japana-rusa milito (1904-1905) li publike kritikis tiun militon. Li skribis: „Jesi al militkomenco kun Rusio signifas jesu al pereado de Japanio.” Pli kaj pli li fortigis sian kontraŭstaron al militoj ĝenerale. La postenoj ĉe ĵurnalo li for-

lasis, ĉar ankaŭ la libera ĵurnalo, kie li laboris, aprobis la tiaman japanan militpolitikon.

Aliflanke la dependiĝo de japanaj kristanoj al Okcidento li kritikis kaj por sendependa, memstara kredo pledis. Li skribis:

„Okcidento pereos pro la okcidenta civilizo. Akceptinte tiun civilizon, Japanio eĉ pli frue pereos. (...) La tiel nomata kristanismo estas okcidentigita kristanismo kaj multajn venenaĵojn kunportas. Japanio, Ĉinio kaj Barato devas sin mem retrovi por sin savi.”

### Senpreĝeja kristanismo

Trovinte sian lokon, nek en kristanaj, nek en ŝtataj institucioj, nek en ĵurnalismo, li fine kiel aŭtoro kaj preleganto memstarigis vivtenante sin per propra gazeto *Bibliaj Studoj* kaj per



*Tiu ĉi preĝejo en la urbo Kawasaki supre grandlitere informas pri kurso de „Anglalingva konversacio” kaj sube super kruco malgrandlitere, ke temas pri kristana eklezio.*

prelegoj memorganizitaj kaj invitataj. Li opiniis, ke ne necesas lerni de misiistoj kiel transdoni la evangelion al japanoj, kaj anstataŭ konstrui preĝejon, li sekvis ekzemplojn de konfuceismaj kleruloj, kiuj kolektis aŭskultantojn al siaj regulaj prelegoj. Tiun formon li nomis „senpreĝeja kristanismo” (japane: *Muk-yokai*). Gravus substreki, ke li, kvankam laŭforme sekvante la japanan tradicion, enhave tute ne elpensis ian japanecan kredon. Tute male. Foriginte kulturajn kaj organizajn aldonojn akumulitajn en la okcidenta kristanismo, kiuj malsamas inter diversaj eklezioj kaj konfuzas pre-



*Kun Nitobe en agrikultura lernejo (1881) (plej maldekstre Nitobe, plej dekstre Utimura).*



*Kun Nitobe, kvindekjara jubileo de kristaniĝo (1928) (centre sidanta Utimura, dekstre sidanta Nitobe).*

cipe neokcidentajn kredantojn, li sentis, ke tiel pli bone eblas koncentriĝi pri la kerna mesaĝo de la kristana kredo: krucumo kaj resurekto de Jesuo.

### Influo de Utimura

Post la morto de Utimura, liaj disĉiploj daŭrigis kunvenojn kun pribibliaj prelegoj. Ĝis hodiaŭ en multaj lokoj tra Japanio, kelkloke ankaŭ en Koreio kaj Tajvano, estas tiaj kunvenoj, parte okazantaj en privataj hejmoj, parte en publikaj kunvenejoj. (La kunvenformo fakte iom similas al esperantistaj rondoj.) Ankaŭ liaj pribibliaj studoj estas ĝis nun legataj, i.a. de preĝejaĵaj pastoroj.

Sed lia influo ne limiĝis al la kristana medio. Liaj verkoj ĝis nun estas legataj en Japanio ankaŭ ekster kristanaj rondoj. Mi memoras, ke lia verko estis inter rekomendataj legaĵoj por lernantoj en mia loka publika mezlernejo.

Dum la dua mondmilito kelkaj el liaj disĉiploj apartenis al malmultaj ardaj kritikantoj de la japana militismo. Kaj post la fino de la milito, liaj iamaj disĉiploj, kvankam nombre malmultaj, signife kontribuis al la restarigo de nova Japanio, plej konataj la unuaj du postmilitaj rektoroj de Tokia Universitato, kiuj precipe penis por reformo de la japana instrusistemo.

Inter liaj sekvantoj troviĝas ankaŭ esperantisto Isiga Osamu<sup>1</sup> (Iŝiga Osamu, 1910-1994), konata kiel tradukanto al la japana de verkoj de la sveda nobelpremiito pri literaturo Selma Lagerlöf. Li ŝajne aplikis la sintenon de Utimura al Esperanto: Unuflanke li lernis Esperanton kiel ilon por paco. Eksciinte per tiu lingvo pri internacia militrezista movado, dum la milito li deklaris, ke li rifuzas militservon kaj estis arestita. Aliflanke li kritikis la superecon de la eŭropanoj je Esperanto kaj alvokis al „Orienta Esperanto”, por igi la lingvon pli intima kaj facila por azianoj.

**Kimura Goro Christoph**

1. Pri Isiga Osamu: Kimura Goro Christoph: *Ĉu eblas deeŭropigi Esperanton?*, en: *Japana Esearo* N-ro 4 (Libroteko Tokio), 83-89.



**La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL**

Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen,  
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00  
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: [retbutiko@retbutiko.net](mailto:retbutiko@retbutiko.net)  
skajpe fel-monato  
[www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

# La solvo de la flaŭra enigmo

## (Monato 11/2010)



ROBERT S. DONOVAN

Nur 1 letera kaj kelkaj retaj reagoj alvenis al nia (ne tute) flaŭra enigmo. Tri (fidelaj) solvintoj gratule ricevos libropremion, nome: Malcolm Jones (Britio), Jackie Huberdeau (Francio) kaj André Sandoz (Svisio).

La trovendaj vortoj estas: **horizontale**: onagr', aniza, larik', ekion, ilici', dali' (ĉar la priskribo vertikale devus esti prepozicio kaj NE malgranda!), otide kaj **vertikale**: nap', ailant', akileon, bambua kaj cedrata.

Jean Pierre

|    | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|
| 1  |   |   | L |   | B |   | D |   | A |    | G  |    | F  |    | T  |    | U  |    | A  |    | Ŝ  |    | A  |    | C  |    | M  |    | E  |    | T  |
| 2  | A | M | U | L | E | T | O |   | P | L  | U  | D  | A  | Ŭ  | R  | I  | G  | A  | S  |    | I  | N  | G  | R  | E  | D  | I  | E  | N  | C  | A  |
| 3  |   | O | N | A | G | R |   | E | R | O  | D  | I  | S  |    | A  | D  | A  |    | T  | E  | M  | O  | N  |    | D  | I  | S  | M  | U  | E  | L  |
| 4  | U | R |   | D | I | U | R | N |   | P  | R  | A  | A  | V  |    | E  | N  | B  | A  | T  |    | M  | A  | G  | R  | A  |    | O  | A  | Z  | A  |
| 5  |   | T | E |   | N | A | I | V | A |    | A  | B  | D  | I  | K  |    | D  | I  | K  | U  | L  |    | T  | E  | A  | M  | A  |    | N  | U  | R  |
| 6  |   | E | B | O |   | S | P | E | C | I  |    | L  | A  | P  | A  | R  |    | O  | O  | L  | I  | T  |    | A  | T  | A  | K  | U  |    | R  |    |
| 7  | A | Z | O | T | A |   | A | N | E | K  | S  |    | N  | U  | D  | E  | C  |    | N  | A  | B  | A  | B  |    | A  | N  | I  | Z  | A  |    | S  |
| 8  | N |   | N | A | N | A |   | A | T | O  | M  | A  |    | R  | U  | Ĝ  | I  | G  |    | R  | A  | B  | A  | D  |    | T  | R  | U  | L  | E  | T  |
| 9  | S | K | A | R | A | B | A |   | O | N  | E  | K  | A  |    | K  | O  | L  | O  | N  |    | N  | E  | B  | U  | L  |    | O  | R  | I  | G  | U  |
| 10 |   | E |   | I | S | K | I | O |   | A  | R  | I  | S  | T  |    | N  | I  | L  | O  | N  |    | L  | I  | R  | I  | K  |    | A  | F  | I  | D  |
| 11 |   | N | R |   | T | A | L | K | O |    | A  | L  | I  | E  | S  |    | N  | U  | M  | I  | D  |    | L  | A  | R  | I  | K  |    | O  | D  |    |
| 12 |   | J | O | N | I | Z | A | S |   | A  | L  | E  | G  | R  |    | I  | D  | L  | I  | S  |    | P  | U  | D  | L  |    | V  | A  | R  |    | O  |
| 13 | G | A | J | E | G | A | N |   | A | R  | D  | O  | N  |    | A  | D  | R  | O  | N  |    | M  | O  | L  | A  |    | Ŝ  | A  | Ŭ  | M  | O  | N  |
| 14 |   |   | A | R | M |   | T | O | F | O  |    | N  | A  | S  | K  | I  |    | N  | A  | B  | O  | N  |    | N  | A  | T  | R  |    | I  | R  | I  |
| 15 | F | A | L | V | A | N |   | P | I | M  | P  |    | S  | E  | T  | L  | U  |    | L  | A  | K  | E  | A  |    | S  | A  | T  | O  |    | O  | K  |
| 16 |   | D | I |   | T | A | S |   | N | E  | O  | N  |    | D  | O  | I  | R  | T  |    | S  | M  | A  | L  | T  |    | T  | E  | D  | A  |    | S  |
| 17 | F | O | S | F |   | P | U | D |   |    | K  | I  | Ĉ  |    |    |    | Ĝ  | A  | Z  |    | A  |    | E  | O  | N  |    | R  | O  | Z  | A  |    |
| 18 |   | S | M | U | T |   | L | E | G | I  | E  | T  |    | E  | M  | B  | O  | L  |    | E  | L  | F  | O  | N  |    | Ŝ  | O  | R  | I  | K  | O  |
| 19 | O |   | A | E | R | O |   | Ŝ | A | K  | R  |    | P  | R  | A  | A  | N  |    | E  | K  | I  | O  | N  |    | Ĉ  | A  | N  | O  |    | O  | M  |
| 20 | L | A |   | L | U | K | T | I | S | T  |    | P  | R  | I  | S  | M  |    | I  | L  | I  | C  | I  |    | E  | O  | L  | O  |    | E  | M  | U  |
| 21 |   | L | O |   | S | T | O | R |   | E  | B  | L  | I  | G  |    | B  | O  | R  | A  | S  |    | N  | A  | F  | T  | O  |    | K  | O  | P  | L  |
| 22 | T | I | N | E |   | A | M |   | B | R  | U  | E  | M  |    | K  | U  | B  | A  | N  |    | Ŝ  | O  | C  | I  | O  |    | T  | E  | Z  | A  |    |
| 23 |   | D | A | L | I |   | B | U | R | A  | S  | K  |    | E  | R  | A  | O  | N  |    | E  | T  | N  | I  | K  |    | O  | R  | D  | I  | N  | A  |
| 24 | S | A | N |   | D | I | A | R | E |    | O  | T  | I  | D  | E  |    | L  | A  | N  | T  | A  |    | D  | A  | M  | N  | O  |    | N  | O  | N  |
| 25 |   | D | U | K | O | N |   | A | Z | E  | N  |    | L  | A  | M  | A  | O  |    | I  | N  | T  | U  | A  |    | D  | I  | A  | K  | O  | N  | O  |

## anoncetoj

Survoje al la UK Kopenhago, de 18-23 julio 2011 la **Hamburga Somero (HoSo)** atendos vin en Germanio. Temo: "Hamburgo - mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011". Interrete [www.esperanto-hamburg.de/hoso](http://www.esperanto-hamburg.de/hoso)

**Vizitu Ipernity**, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al [www.iper-nity.com/?lg=eo](http://www.iper-nity.com/?lg=eo) Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO sen-paga elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prele-ga programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knaipo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: [www.interna-cia-festivalo.de](http://www.interna-cia-festivalo.de).

**"Naturista Vivo"**, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

**Esperanto-instruistoj:** vizitu [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon/mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

## La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

**SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO**

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

**MONDKULTURA  
SENDEPENDA  
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO  
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

[lagazeto@osiek.org](mailto:lagazeto@osiek.org)

<http://www.lagazeto.com>

## La KancerKliniko

**Politika Kultura Skandalema Ajnista**  
**4 numeroj jare + La Krom**

[ikk@free.fr](mailto:ikk@free.fr)

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)  
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris  
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



Ĉu vi jam legis?



## Plej furoris en 2010

1. Trevor Steele: Flugi kun kakatuo
2. La jaro 2011
3. Alexandre Dumas: La grafo de Monte-Kristo
4. Trevor Steele: Kvazaŭ ĉio dependus de mi
5. Willem Elsschot: Kiel vaglumoj
6. Anna Löwenstein: Morto de artisto
7. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
8. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni
9. Ilustrita oficiala radikaro
10. Lidia Zamenhof: Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj
11. Charles Darwin: La origino de specioj
12. Stefan MacGill: Nemave edifi
13. Katalin Kovacs: Poŝamiko
14. Willy Vandersteen: La brusela bubo
15. Van Damme kaj De Vleminck: Grammaire ABC
16. Jean Codjo: Aventuro en mondo de ŝajnigado
17. Maria Becker: Internacie kuiri
18. Antoine de Saint-Exupéry: La eta princo
19. Ziko van Dijk: Informado praktike
20. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo

La jenaj 20 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2010. Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net), sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.